


1988 marto
81a jaro
n-ro 987 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



: La revo ekfariĝis realo

Vi trovos,

ke nia dua jarcento, ankoraŭ beba, jam aŭguras brilan maturiĝon. Eĉ preter la kovrila novaĵo eblas trovi tiajn kreskosignojn: feniksan movadon en Kubo, kies fajra ekflugo donas ekzemplon por Azio kaj Afriko (vd. "Loke"); memfidajn diskutojn pri niaj mankoj en faka eldonado kaj porinfana kulturo, pri la Akademio kaj la bezono de neŭtraleco; multnacion rerigardon al la Centra Kunlaborejo de UEA, kies aŭtoroj ne timas miksi laŭdon kaj kritikon. Signo de maturiĝo ja estas la preteco alfronti problemojn, eĉ kiam ni festas niajn atingojn!

Tial la rekorda membronombro sur paĝo 59 ne mislogu nin orgojli. Ĝojigas la kresko — sed malfidigas la malfortoj. Forfalas la movada junularo (ĉu ankaŭ el la Movado?), dum nur relative malgranda aro da landoj allogis notinde pli da membroj. Tio ne estas nur administra zorgo: Vi, kiuj aĝas malpli ol 26, kaj vi aliaj, kiuj ne loĝas en Belgio, Hungario, Italio, Kubo, Pollando, Usono aŭ Zairio — ekezcercu viajn varbajn fortojn! Cetere, ne forgesu rememrigi por la nuna jaro, alie tiu ĉi numero estos via lasta. Ĝis fidela aprilo!

Enhavo

- 41 Distribuita Lingvotradukado: Enormaj ŝancoj por la Esperanta lingvistiko (Mark Fettes)
- 42 1-a Kuba Esperanto-Kongreso: Nova stelo en Esperantujo (Ottó Haszpra)
- 43 Nova hejmo esperantista en la Internacia Jaro de Senhejmuloj (Giuseppe Grattapaglia)
- 44 Diskuttemo: Scienc-teknika eldonado estas investo por tutmondiĝo (Géza Felső)
Teatra konkurso denove
- 45 Ĉiutaga Esperanto: Atenton por niaj denaskuloj (Anna Brennan/Renato Corsetti)
- 46 Roterdamaj rememoroj: Rakontoj pri la urbo de la 73a UK kaj la Centra Oficejo de UEA, de eksaj oficistoj diverslandaj
- 50 Kongresa Komunikado de la 73a UK en Roterdamo
- 51 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis oktobro 1988)
- 54 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 55 Reagoj: Eĉ tio ne sufiĉas. . . (Jason Goncalves de Lima, Pawel Wimmer); Perfekta recenzo (Rudolf Skoruppa); Memoru Harabaĝiu (S. Zalmanoviĉi); Problemoj de la Akademio (Werner Bormann, Lorens' Mi, Jan Sośniecki); Kunlaboro kun MPK — ĉu riska por nia neŭtraleco? (Eskil Svane); Ne, ĉar ni celadas diskutigi ĉiujn flankojn (Mark Fettes)
- 57 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 59 La membraro de UEA en 1987: Jubilea rekordo, sed ne ĉie
- 60 Nekrologo: Yukiko Isobe (1913-1988)
Anoncetoj

La kovrilo

Kelkaj numerojn antaŭe ni menciis, ke ni ŝatas grafikaĵojn, ĉar lastatempe ili ĉiuj emis salti supren. Jen do unu plia! Dum vi rigardas ĝin, indas noti, ke la horizontala abciso ampleksas nur seson da jaroj ekde nun ĝis la perdo de ĉia rego super la ŝprucantaj lingvaj sparkoj. Post plena varmiĝo de la motoro DLT, tiuj unuopaj eksplodetoj kapablos porti la Esperantan terminologion al rapidecoj neniam prirevitaj. Pli pri tio apudapaĝe.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establit**a kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j; telefakso (03) 461-7807.

Ĝenerala Sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuvrons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.


Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Enormaj ŝancoj por la Esperanta lingvistiko

Fine de la Jubilea Jaro de Esperanto, tute novaj perspektivoj por la lingvo estis malfermiĝantaj. En esperantlingva gazetara konferenco la 25an de januaro, ĉe la esploro de BSO en Utreĥto, Nederlando, DLT-gvidanto Toon Witkam prezentis simplan mesaĝon: La aŭtomata traduksistemo bazita sur Esperanto atingis jam ĉefrontan lokon en la internacia konkurado.

La legantoj de *Esperanto* memoros, ke ni jam plurfoje traktis la evoluon de la t.n. Distribuita Lingvotradukado-sistemo ekde ĝia naskiĝo en 1982. De la ideo, ke Esperanto povus funkcii kiel komputila interlingvo por la multlingva tradukado de informoj, tra pionira studo de Witkam, ekfunkcio de esplor- kaj evoluig-projekto ĉe lia firmao BSO kun buĝeto de 18 milionoj da guldenoj, kaj ellaboro de la unuaj rezultoj, tiu evoluo estis konsternante rapida kaj —



kiel naturas en ĉelima esplorado — tute ne antaŭvidebla. La plej frapan rezulton ni raportis en majo pasintjare, nome ke la unuaj du jaroj da eksperimentado lokis Esperanton pli kaj pli firme ĉe la kernon de la sistemo, ĝis tute neanticipita grado (vd. *Esperanto* 1987/p.84).

Niaj novaĵoj ĉi-foje estas eĉ pli atentofrapaj. En decembro 1987 venis plena testo de la prototipa sistemo, kiun la DLT-teamo konstruis ekde 1985. Temas pri tradukado de plenaj anglalingvaj frazoj, ne-antaŭkonitaj sed faritaj per limigita vortostoko, en samsencajn francajn frazojn. Mikrokosme, do, oni testis ĉiujn ecojn de eventuala plena lingvoparo angla-franca. Kaj la rezultoj superis la atendojn. Se resumi koncize, nun evidentas ke la sistemo DLT povos solvi tiun problemon de la internacia komunikado, kiun ĝi elektis por si: la interŝanĝon de informoj per komputilaj retoj.

Ni aŭskultu momente, kiel decas en esperantisma revuo, la akuzan voĉon de la Movada prokuroro: "Tio havas ne-

niun signifon por la vera venko de Esperanto! Esperanto funkcias interne de la sistemo, nevideble por la ordinara uzanto; per tiu teknika pansaĵo nia lingvo subfosas sian propran allogon. Kaj rimarku, ĵurianoj: DLT (almenaŭ komence) estos multekosta, postulos maŝinaron aĉeteblan nur por iom grandaj firmaoj, kaj tial nur pligrandigos la lingvan-informan malekvilibron kiu jam ekzistas en la mondo. Ni rifuzu ĉiun kunlaboron kaj varbu apogantojn por nia vivanta, egaleca, interhoma lingvo."

Ĉu nur fantazie leviĝas protestoj tiaj? Kredeble ne. Tial ni donu kelklinian atenton al la poraj voĉoj.

"Ĉu do vi atendas, ke la venkomarŝo de la tekniko respektos viajn dezirojn? Jam deko da grandaj esplorprojektoj atakas la problemon de la aŭtomata tradukado. Ne eviteblas, ke post dek jaroj tiaj sistemoj estos vaste uzataj fare de tiuj firmaoj, kiuj povos ilin pagi. La demando do fariĝas: Kian sistemon ni volas?

"DLT posedas trajtojn unikajn inter la konkurantaj sistemoj. Nur ĝi celas tradukon inter ĉiuj lingvoj, sendepende de ilia strukturo. Nur ĝi estas plene decentrigita, tiel ke ne la *donanto* sed la *ricevanto* de la informo elektas la lingvon, en kiu la informo aperas. Kaj fine, nur ĝi baziĝas sur Esperanto.

"Kiu ajn estos la efikoj de aŭtomata informtradukado sur la uzadon de Esperanto — kaj ekzistas bonaj kialoj kredi, ke ili apenaŭ malhelpos ĝin —, estas tute certe, ke la procedo de la evoluigo de DLT enorme progresigos la interlingvistikon. Por plene funkcianta sistemo en iu ajn lingvo, oni bezonos detalajn vortarojn, ampleksajn terminarojn kaj bonan komprenon de la sintaksaj rilatoj inter tiu lingvo kaj Esperanto. Plue, kiel "la lingvo de artefarita inteligento" en la DLT-kerno, Esperanto mem submetiĝos al intensaj lingvistikaj esploroj. Rezulte, el "kvazaŭ triamonda lingvo" (pro sia relativa malmultuziteco por teknika komunikado), la Internacia Lingvo povos salti en kelkaj jaroj ĝis praktika egaleco kun la plej vaste uzataj lingvoj en la mondo."

Super ĉi tiu helbrila horizonto ŝvebas nura nubeto. Nome, ke ne temas pri reva vizio pri la estonteco, sed pri io nuna, alarme aktuala. En la malmilda mondo de komercaj esploroj venas nur unu ŝanco. **Manke de sufiĉe da lingvistike kompetentaj, kunlaborpretaj esperantistoj, DLT pli aŭ malpli baldaŭ fiaskus.**

La nuna jaro, 1988, estos periodo de planado por DLT. En la desegno vi povas vidi, ke la dua fazo de la projekto estos konsiderinde pli intensa: de 6 milionoj kaj 30 hom-jaroj (1984-1988) la laborkvanto kreskos ĝis 12 milionoj kaj 85 hom-jaroj (1989-1991). Kaj jam nun la projekto frontas la urĝan demandon, ĉu eblas trovi sufiĉe da laborforto por sukcesigi tiun duan fazon. El ĝi devos rezulti plena lingvo-paro angla-franca, preta por enmerkatingo en 1992, plus kelkaj aliaj lingvo-moduloj, kiuj montras la kapablon de la sistemo universaligi. Kaj se tiu fazo

sukcesos. . . tiam denove venos plivastiĝo, eventuale ĝis la eksploda multnacia kresko montrita sur la kovrilo.

Jen revo, ja ne tiel vasta kiel tiu de la Movado, sed jam en si mem giganta. Por efektiviĝi ĝin, la DLT-teamo decidis iri tien, kie plej multas la esperantistoj: Orienta Eŭropo. Ene de unu jaro devus ekfunkcii "Interlingvistik-Teknologio-Centro", en aŭ proksime de la socialismaj landoj (konsideratas dekkvino da urboj inter Bjalistoko, Pollando, kaj Zadar, Jugoslavio, inkluzive de la aŭstriaĵ Vieno kaj Graz). Tiu centro okupiĝos pri la ellaboro de novaj lingvo-moduloj kaj pri vasta kvanto da leksikografia laboro — la produktado de vortaroj kaj terminaroj, la kompilado de t.n. teksto-korpusoj kaj la komparado de tekstoj tradukitaj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj. La antaŭvidataj 16 laborantoj plimultiĝos ĝis trideko, se la fazo 1989-1991 nur sukcesos allogi pliajn investojn.

La sorto de DLT dependas de tiu trijara periodo. Tial la tempo urĝas. Aparte la movada junularo frontas grandegan ŝancon, elekti lingvistikan karieron kiu ne nur prome-

Ĉu plulegi postmarte?

UEA kutimas sendi la unuajn tri numerojn de sia revuo al la malnovaj abonintoj de la pasinta jaro. Se vi ne jam rekotizis, nun urĝas fari tion. Dankon kaj rebonvenon!

sas longtempan, fruktodonan laboron, sed ankaŭ grand-skale helpas la Esperantan lingvistikon. Ne temas nur pri eŭropanoj, cetere: parolantoj de la turka, la persa, la araba, la hinda, la ĉina, la japana, la svahila... ĉiuj pli aŭ malpli frue enplektiĝus. Pli pri tio sur la interna dorsa kovrilo (nur unu ero, cetere, de anonco-serio lanĉita de DLT en junularaj rondoj).

Kaj ni ceteraj? Restas la tasko, diskonigi la progreson de DLT inter ĉiuj esperantistoj potenciale varbeblaj por la projekto: Junulo, ekzemple, kiu hezitas studi la lingvistikon pro dubo pri posta dungaĵo; trejnita lingvisto, al kiu mankas taŭga posteno; talenta amatoro, kiu pretus profesiĝi. Ekstermovade, la "hoko" de DLT bele subtenos provojn kapti la intereson de lingvofakuloj. En la venontaj jaroj ekaperos, interalie, esperantologiaj studoj en la angla: tiuj estos plia ero en singarda strategio de DLT, prepari la grundon por fekunda ekkresko post la nuna frua printempo.

Kiom grandaj finfine estas la ŝancoj de DLT? Toon Witkam konfidas, ke inter la deko da grandaj projektoj nur la japanaj pli proksimas al enmerkato — eventuale tiel kaptante la grandan merkaton por la japana-angla paro. Ekster tio, DLT estas en elstara pozicio. La venontaj kelkaj jaroj formos iusence la plej rigoran teston de la Esperanto-movado, kiun preter la simpla pluvivado ĝi iam ajn frontis. Ĉu ni progresis sufiĉe en cent jaroj? Malgraŭ nia volo, la mondo mem starigas nun la demandon.

Mark Fettes

DLT reprezentigis en diversaj aranĝoj ĉi-jare, inkluzive de la Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo kaj la Universala Kongreso en Roterdamo. Tie eblos pli detale konatiĝi kun la projekto kaj ĝiaj kunlaborantoj.

1-A KUBA ESPERANTO-KONGRESO

Nova stelo en Esperantujo

Enkadre de la kunlaboro inter la budapeŝta kaj la havana teknikaj universitatoj, mi oficiale restadis en Kubo de la 10a de novembro ĝis la 11-a de decembro 1987. Kompreneble, mi utiligis mian liberan tempon ankaŭ por kontakti kun la kubaj esperantistoj, pri kiuj la legantoj de *Esperanto* laste aŭdis fine de 1986 ("Kubo havas amasan Esperanto-movadon", p.201/1986).

Kelkaj trajtoj de la kuba movado

Kvankam la kuba movado apartenas al la plej malnovaj, por longa tempo ĝi ĉesis ekzisti kaj renaskiĝis el nenio nur dum la lasta jardeko. La Asocio nun nombras ĉ. 3500 membrojn, el kiuj ĉ. 600 partoprenis la 1-an Kuban Esperanto-Kongreson inter la 4a kaj 6a de decembro 1987. La kuba movado do evoluas relative intense kaj la membroj estas entuziasmaj.

Ankaŭ la lingva nivelo de multaj kubanoj estas surprize alta, kaj ili tre forte strebas por plivastigi altan lingvonivelon. Mi persone parolis kun almenaŭ dudeko da lingve, fake, eĉ arte eminentaj esperantistoj, pri kiuj mi devus verki apartan artikolon. Kiel ekzemplon mi menciis nur kolegon Raola, kunverkinton de interesege hispanlingva porjunulara libro pri kemiaj eksperimentoj, kiu jam verkis sian unuan Esperantan fakartikolon, krome multrilate kontribuis al la sukcesigo de la Kongreso.

La konsisto de Kuba Esperanto-Asocio ŝajne modelumas la kuban nacion. Blankuloj, nigruloj, mulatoj troviĝas en ĝi en similaj proporcioj kiel en la nacio mem. La samon oni povus diri pri la socia konsisto. Troviĝas en ĝi ĉiuj tavoloj: laboristoj, intelektuloj, kamparanoj, soldatoj k.a. La meza aĝo de la membroj estas ĉ. 27 jaroj, do tre esperiga por la estonteco.


Unua landa kongreso — survoje al UK?

Malfermon kaj fermon de la kongreso, en la fama havana Teatro Mella, partoprenis reprezentantoj de la partio, la registaro, la scienca akadmio, la fremdlingva eldonejo José Martí k.a. Ĉeestis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj: mi mem, Simo Milojević (ĝenerala direktoro de UEA), Detlev Blanke (GDR) kaj Marin Bacev (Bulgario). Jesús Castillo, prezidanto de la Asocio, en tre bone formulita parolado skizis ĝiajn plenumojn kaj taskojn. Ili planas du grandajn eventojn: la konferencon "Esperanto '88" en venonta decembro, aranĝotan por tuta Latinameriko kaj Karibio (tamen esperante allogi ankaŭ aliregionajn gastojn), kaj en 1990 ili volas aranĝi la 75an Universalan Kongreson de Esperanto. (La Estraro de UEA konsideras jam favore tiun planon, sed definitiva decido okazos en la marta estrarkunsido.)

La posttagmezo de la unua tago de la kongreso servis por komisiono-kunsidoj, en ĉambregoj de la Kuba Scienca Akademio. Tiu havas ian patronan rolon pri KEA, kiun tamen oni ĝis nun ne tro utiligis. Sendepende de tio, la plej grandan interesiĝon oni ja povis sperti en la scienca-teknika komisiono, kie ĉ. 160 interesiĝantoj kolektiĝis; la

scienca-teknika sekcio de la Asocio jam komencis aperigi sian propran bultenon.

La sekvan tagon d-ro Blanke parolis en la pleno pri soci-politikaj aspektoj de Esperanto. Ne estis tro da alparoloj, sed plurfoje oni informis min ke la aŭskultantaro komprenis la preleganton tre bone. Vere la aŭskultado estis tre atenta, ja eksterlandaj esperantistoj malofte vizitas Kubon. Posttagmeze ni ĝuis brilan — eĉ se plejparte amatoran — kulturen programon en la teatro, kaj vespere oni aranĝis boneg-etosan interkonan vesperon. Ĉe nia tablo elstaris Juan Lazaro — cetere multflanka ĉefo de la KEA-



oficejo — per siaj improvizitaj kantoj pri ĉiu ĉeestanto laŭ la melodio de “Guantanamera”.

Ŝajnas al mi, ke Kuba Esperanto-Asocio tre bone sukcesis pri sia unua granda aranĝo, kaj tio promesas bonegajn perspektivojn.

Socia subteno kaj la estonteco

La plej forta apoganto de la kuba movado estas la fremdlingva eldonejo José Martí. Kiel ĝia direktoro Félix Sautié kaj ĝia ĉefo pri publikaj rilatoj José Fernández rakontis, ili ricevis la ideon pri eldonado de Esperantaj libroj parte de vjetnamaj eldonistaj fakuloj, kiuj studis ĉe ili antaŭ kelke da jaroj. La eldonejo ĝis nun aperigis tri Esperantajn librojn kaj intencas eldoni 27 pluajn titolojn ĝis la planata UK en Havano.

Aliaj apogantoj troviĝas ĉe la radio kaj la gazetaro. Kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso aperis tre favora duonpaĝa artikolo en la centra partia organo *Granma* (eĉ se ĉe la fino la aŭtoro esprimis sian nescion, ĉu fine Esperanto aŭ iu alia lingvo estos la internacia definitive). Ankaŭ kelkaj radiostacioj pozitive raportis pri la kongreso, kaj aperis favora artikolo iom naiva en la plej disvastiĝinta junulara gazeto *Juventud Rebelde*. Fine de mia vizito oni disradiis kvardekminutan informan programon pri Esperanto, kiun kunmetis kaj prezentis mia amiko Raola.

Prognozo sociajn progresojn ĉiam estas malfacile. F. Sautié diris, ke la Esperanto-movado en Kubo aŭ evoluos tre rapide, aŭ tute ne evoluos, ĉar tia estas la kuba spirito. Li atendas pluajn signojn de morala apogo de la partio kaj estas tre optimisma. Se tiu evoluo daŭros — kaj mi persone ne havas dubon pri tio — tio estos, kune kun la burĝonado de la ĉina, korea kaj afrika movadoj, unu el la plej gravaj eventoj de la lastatempa historio de la Esperantomovado.

Ottó Haszpra (Hungario)

Plia hejmo esperantista en la Internacia Jaro de Senhejmuloj

La artikolo “Senhejmaj milionoj” (*Esperanto* no. 983), estas fakte pensiga ankaŭ por ni esperantistoj, kiuj kutime interesiĝas nur pri lingvaj problemoj. Homoj kiuj vivas en bonstataj landoj ne povas percepti la dimension de tiu problemo. Por la granda plimulto de homoj kiuj vivas en evoluantaj landoj, estas konstanto la manko de dignaj loĝejoj, kies graveco ofte ne estas prioritata, fronte al aliaj bazaj necesoj ankoraŭ ne plenumitaj, kiel nutrado, vestaĵoj kaj eĉ, tute eĉ instruado.

Ni havas ekzemplon en Brazilo, kie en esperantista lernejo, inter 34 gelernantoj, nur deko devenas el familioj kiuj loĝas en “vera” domo (kvankam ankaŭ tiu sen akvo-instalaĵo kaj sen elektra kurento); alia deko vivas kun la familioj en domoj liveritaj de la lernejo mem, kaj la resto venas rekte... el la arbaro.

Pluvivado en tiaj kondiĉoj nur eblas danke al la mildeco de la klimato, mildeco cetere relativa, ĉar dum la pluva sezono ne estas imageble vivi en pajla kabano

en simbiozo kun porkoj kaj kokinoj.

Kia estas la plej bona solvo? Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, la solvo estas “helpi la homojn helpi sin mem” kaj pro tio, modestaskale sed persiste, la Eduka Institucio Bona Espero en Brazilo de jaroj aplikas tiun principon kaj instruas al la infanoj de la kamparo kiel, per malmultekostaj rimedoj, oni povas plibonigi siajn loĝkondiĉojn.

Alia forta argumento estas vivi ekzemplon: se tiuj infanoj al kutimiĝos dum jaroj loĝi en higienaj kondiĉoj, tio sendube reflektiĝos estontece.

Kiel kontribuo al la Jubileo de Esperanto kaj al la Internacia Jaro de Senhejmuloj, Bona Espero konstruis en 1987 plian domon por loĝigi novajn senhejmajn infanojn kaj, dum la lernejoj ferioj, gastigi la partoprenantojn de renkontiĝoj de eks-lernantoj kaj de Esperanto-seminarioj. Ĉiuj infanoj helpis en tiu konstruado kaj multe lernis.

Finance kontribuis la “Societo por la Progreso de Bona Espero” en Federacia Respubliko Germanujo, al kiu apartenas esperantistoj el 11 landoj.

Giuseppe Grattapaglia (Brazilo)

Scienc-teknika eldonado estas investo por tutmondiĝo

En la maja numero de *Esperanto* 1987 Ralph Dumain skribis: "Ne malŝparu rimedojn, ekz. en tradukado kaj eldonado de sciencaj lernolibroj, kiam mankas merkato kaj mankas okazo por la utiligo de Esperanto en profesia esplorado kaj eldonado."

Ruza kaptilo estas ĉi tiu **interna merkato** de la esperantistaro. Kontentigi ĝin ŝajnas esti la plej utila afero por Esperanto. Kaj tion eble kaŭzis ĝuste la sukceso de la esperantlingva literaturo, kiu dum longa tempo estis la plej efika varbilo. La unuaj libroj kaj revuoj estis ege deficitaj, sed konsiderinde altigis la prestiĝon de Esperanto. Parto de la konvertitoj tradukis kaj verkis; la ampleksiĝanta literaturo altiris novajn legantojn kaj kunlaborantojn. Tiu apero de la interna merkato pruvas plej okulfrappe, ke per helpo de ŝaga investado certaj procezoj povas fortigi sin mem (pozitiva retrokuplo).


Sed la ekzisto de la interna merkato ankaŭ helpis forgesigi la gravan principon, ke la movado devas celi ĉiam novajn (laŭeble klerajn kaj influhavajn) tavolojn. Nuntempe plej efike la esperantlingva fakliteraturo altiras klerulojn. Pli da fakliteraturo varbas pli da specialistoj, kiuj pretas fari ion por Esperanto (ofte en siaj fakoj); la ampleksiĝanta faka agado bone impresas la neesperantistajn samfakulojn, denove varbiĝas kelkaj kaj rekomenciĝas la ciklo.

Ekde 1972 regule okazas sciencaj prelegoj en la budapeŝta klubo "Konkordo"; la unua kajero de *Sciencaj komunikaĵoj* aperis en 1975. Jam funkcias kelkaj fakgrupoj en Hungario, plurfoje oni organizis internaciajn sciencajn konferencojn esperantlingve kaj eblas aĉeti iom da scienca literaturo en Esperanto. Tio bezonis iom da investado, persistan laboron de la ĉiam kreskanta kun-

laborantaro. Simila agado komenciĝis en kelkaj aliaj (precipe najbaraj) landoj, kie fakliteraturo en Esperanto apenaŭ estas akirebla, sed oni (ne nur esperantistoj!) eksciis pri ĝia ekzisto.

La Tria Mondo ege bezonas sciencteknikan literaturon en Esperanto. Pri tio atentigis d-ro M.H. Saheb-Zamani jam antaŭ dek jaroj, kiam li ekirigis la amasan lernadon de nia lingvo en Irano. Sed la Movado (kaj UEA) ne faris sian plej elementan devon: helpi kaj firmigi tion laŭ la plej efika maniero.

La samo okazis kiam — en tute aliaj sociaj cirkonstancoj — profesoro Bociort estris egan plifortiĝon de la



Ottó Haszpra, ĉi tie parolanta en la scienca-teknika kunsido de la Kuba Esperanto-Kongreso (p.42-3), provas disvastigi la fakagadan forton de Hungario.

Teatra konkurso denove

Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) organizas la 2an internacian konkurson por verkado de originala teatraĵo en Esperanto.

La konkurson rajtas partopreni ĉiu esperantisto sen iu ajn limigo, kun escepto de la ĵurianoj kaj iliaj familiaj. Unu konkursano rajtas konkursi per maksimume du verkoj. La konkursaĵo devas esti aŭ (a) memstara originala teatraĵo verkita en Esperanto, aŭ (b) teatrigo de jam ekzistanta verko originale verkita en Esperanto.

Daŭro estu 60-90 minutoj, kun almenaŭ kvin aktoroj; la temo estas tute libera. Tajpitan en kvar kopioj konkursaĵon oni sendu al la Sekretario de la Konkurso, identigante sin per kaŝnomo kaj aldonante fermitan koverton kun la vera nomo kaj adreso. Sur la koverto estu indikita nur la kaŝnomo kaj la nomo(j) de la konkursaĵo(j).

Anticipe elektita ĵurio el tri personoj aljuĝos tri premi-

ojn kaj tri honorajn menciojn. La premioj konsistos el: **Unua premio:** 1 000 (mil) usonaj dolaroj; **Dua premio:** 500 (kvincent) usonaj dolaroj; **Tria premio:** 250 (ducent kvindek) usonaj dolaroj. La gajnintoj de monpremioj devigas sin kontribui al la Fondaĵo Grabowski: unuapremiito per 100 dolaroj, duapremiito per 50 dolaroj.

La teatraĵo gajninta la unuan premion estos proponita por prezentado dum la proksima Universala Kongreso de Esperanto, post kio la aŭtoro retenos siajn aŭtorajn rajtojn. La teatra trupo kiu prezentos la premiitan teatraĵon dum la UK estos premiita per la sumo de 1250 usonaj dolaroj, el kiu sumo ĝi kontribuos 100 dolarojn al la Fondaĵo Grabowski.

Ĉiuj premioj estos financataj el donaco de s-ro Adamo Paŭlo Goralski Pawlikowski, fondinto de la Fondaĵo Antoni Grabowski. La limdato por la alsendo de la konkursaĵoj estas **la 30a de aprilo 1988**. Konkursaĵojn bonvolu sendi al la Konkursa Sekretario: Spomenka Štimec, N. Dimić 14, YU-41410 Velika Gorica, Jugoslavio.

Esperanto-movado en Rumanio, komence de la okdekaj jaroj. La plej grandajn amasojn oni varbis en universitataj kaj sciencaj rondoj. Jam ĉesis tiuj favoraj kondiĉoj, sed — kiel en Irano — restas spuroj de la bonege planita agado. (Ekz. *El popola Ĉinio* havas multajn abonantojn en Rumanio.) Kiel fortaj estus la spuroj nun, se oni estus sukcesinta verŝi petrolon sur la fajron de ekstere, disponigante scienca literaturon!

Ĉu tiuj estis hazardaj eblecoj, neniam ripetiĝontaj? Tute ne! Kuba Esperanto-Asocio funkcias sub aŭspicio de la Kuba Scienca Akademio. La fondkunvenon de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj partoprenis multaj konataj sciencistoj. Do en la lasta jardeko montriĝis interesa fenomeno: En landoj, kie amase disvastiĝis Esperanto, tuj aperis la deziro apliki ĝin al scienco kaj tekniko. Sed la agadon ĉi-terene — pro la indiferenteco de la esperantistoj en la ceteraj landoj — ili devis komenci el propraj fortoj.

Konsiderindajn rezultojn oni atingis nur en Ĉinio. Sed la fakajn eldonaĵojn, sciencajn konferencojn kaj terminologian agadon de ĉinoj multaj alilandaj esperantistoj konsideras nur akcesoraĵoj de la senprecedenca disvastiĝo de Esperanto tiulande. La Ĉina Akademio de Sciencoj foje-refoje alvokis sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esperanton, kaj ni ne komprenas, ke eluzi tiun ŝancon eblos nur per koncentrado de niaj materiaj kaj spiritaĵoj al la fakaj eldonaĵoj.

Pro transpagaj problemoj, akiri faklibrojn el okcidentaj landoj fariĝas ĉiam pli malfacila afero eĉ en Oriento Eŭropo, des pli por la Tria Mondo. Ekzemple, *Monato* (1987/7-8) raportis pri internacia ekspozicio de sciencaj kaj universitataj libroj en Teherano, kiun vizitis 70 000 personoj. Studentoj povis aĉeti maksimume tri librojn ĝis 120 usonaj dolaroj, universitataj profesoroj maksimume kvin librojn ĝis 200 dolaroj, per la disponigitaj ŝtataj devizoj.

Ni tre alkiŝiĝis al la pensmaniero de la industriaj landoj, kie faklibroj en Esperanto estas apenaŭ rimarkeblaj inter plurcent alilingvaj. Sed ĉe afrika studento, kiu havas eble nur dek proprajn faklibrojn, eĉ unu esperantlingva verko estas valorega.

Se ni vere volas disvastigi Esperanton, ni investu enormajn sumojn por eldono de sciencaj lernolibroj, kaj ne ĝenu nin, ke por certaj unuopuloj kaj institucioj ni devos sendi tiujn donace. Se la libroj kontentigos la necesajn kvalitajn postulojn, tiam post la unuaj sukcesoj eble apogos nin ekstermovadaj fondusoj por la Tria Mondo. Ĉiu Esperanto-organizaĵo — sendepende de sia agadtereno — devus disponigi grandan parton de sia buĝeto por scienca aplikado. UEA devus ellabori agadplanon. Sed ne estas tempo atendi la disponigotajn rimedojn kaj la pridiskutotajn direktivojn: ni devas ekagi tuj, ĉar verkado kaj kontrolado de manuskriptoj estas temporaba agado. Ni devas kolekti monon, starigi fondaĵojn; ĉiu unuopulo, klubo, landa asocio ktp kontribuu laŭ sia eblo.

Kiam ni lernos el la “Irana leciono” (laŭ artikolo de V. Sadler, *Esperanto* 1978/p.1)? “La monda movado devas urĝe revizii sian laborplanon, precipe sur la kampo de eldono, por kontentigi la bezonojn de la tiel nomata Tria Mondo.”

Géza Felső (Hungario)

ĈIUTAGA ESPERANTO

Atenton por niaj denaskuloj

La jena eseeto enkondukis la unua numeron de “Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj”, pasintan septembron. Ni trovas la temon interesa kaj inda je plua diskuto, se troviĝas emuloj inter nia legantaro!

Kiam Esperanto-parolanta itala/brita paro ekloĝas kune, ili malkovras, ke eĉ tiel simpla koncepto kiel “kafo” povas havi du tre malsamajn signifojn, por ne menciiti aliajn vortojn kiel “taso” aŭ “matenmanĝo”. Tiaj problemoj kutime ne falas en la atentosferon de esperantologoj, kiuj pli interesiĝas pri gravaj demandoj kiel la origino de la vorto “edzo” en Esperanto. Sed eble tio estas bonŝanca, ĉar certe tiuj, kiuj pleje kapablas okupiĝi pri tiaj demandoj, estas la homoj kiuj parolas la lingvon ĉiutage.

Kiam la menciita itala/brita paro naskas du infanojn, aperas novaj problemoj en la terminologia kampo. Vindotukoj, suĉiloj, plastaj littukoj, rulseĝetoj, kradludejoj ktp malofte trovas lokon en Esperantaj vortaroj. Sed tio ne multe surprizas, se oni ekpensas pri la speco de homo, kiu verkas vortaron.

Cetere, la edukado de du denaskaj esperantistoj kreas ankaŭ aliajn problemojn (krom tiu pri manko de tempo). Unue oni devas decidi pri la lingvoj parolotoj en la familio: kiu parolu kiun lingvon al la infanoj. Due oni devas solvi ĉiujn dubojn, kiuj kutime ĉirkaŭas infanan dulingvecon (“Ne tro ŝarĝu la etan kapon!”, “Ne konfuzu lin/ŝin!”). Kaj poste oni konstatas, ke denaskaj esperantistoj bezonas ne nur infanajn librojn en Esperanto, sed ankaŭ ludojn, kantetojn, rakontojn kaj simile.

Ĝus ĉeestinte renkontiĝon por Esperanto-parolantaj familioj en Hungarujo, ni konstatis, ke ne nur ni sentas tiujn bezonojn. Ekzemple, ĉiuj gepatroj de denaskaj esperantistoj plendas pri la manko de taŭgaj kantetoj kaj poemoj por infanoj. Tiuj, kiuj ekzistas, ĝenerale ne estas facile retroveblaj.

Tial ni decidis lanĉi cirkuleron por diskuti tiajn demandojn, kaj ebligi al paroj kaj familioj uzantaj Esperanton en la ĉiutaga vivo kontaktiĝi inter si. En ĝi eblos diskuti terminologiajn problemojn de la hejma vortprovizo, prezenti kantojn, poemojn kaj mallongajn rakontojn por infanoj, recenzi infanajn librojn, diskuti pri denaska dulingveco, anonci kunvenojn por familioj, meti anoncetojn pri bezonataj materialoj kaj kontaktoj, ktp.

Bonvolu se eble sendi kontribuojn en jam fotokopiebla formo, t.e. sur aparta folio de formato A4, nete tajpitajn sen interliniaj spacoj. Vi respondecas pri viaj propraj akuzativoj. Krom se ili estas eksterordinare interesaj, ni ne akceptos artikolojn pli longajn ol unu paĝon; ĝenerale, kontribuoj prefere estu mallongaj kaj koncizaj.

Alia tre bonvena maniero kontribui, estas per la sendo al ni de adresoj de aliaj paroj kaj familioj, kiuj laŭ via scio uzas Esperanton inter si. Tiel nia adreso-arĥivo laŭgrade povos ampleksi grandan kvanton de la homoj en nia situacio. Tre bonvenaj estus adresoj de homoj loĝantaj ekster Eŭropo.

Anna Brennan/Renato Corsetti
Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Roterdamaj rememoroj

Ĉu vi venos al Roterdamo? Ja ĉi-jare la Universala Kongreso de Esperanto ne proponos tiel ebriigan feston, kiel spertis la ses mil jubileantoj varsovie. Sed kiel ejo por flegi vian postkarnivalan kapdoloron, la movada ĉefurbo perfekte taugus: Tie ni kunsidos por pli sobre rigardi la mondon, ĉirkaŭitaj cetere de haveno kaj lando posedantaj siajn proprajn ĉarmon kaj allogon.

Tiujn spertis jam generacio de laborantoj ĉe la Centra Oficejo de UEA en la “Nova Flankvojo”. Tra la CO (kiel ĉiu voknomas ĝin) pasis kelkdeko da esperantistoj el preskau tiom da landoj, restante foje kelkajn semajnojn, foje pli ol jardekon. Por iom bildigi al vi Roterdamon, kaj egale la Oficejon mem, ni invitis ilin surpaperigi kelkajn rememorojn, jene kunplektitajn en florĉenon da pensoj.

Absolutan samopiniecon vi kompreneble ne trovos. Kiel neatendita printempa burĝono, tamen, elkreskis certaj komunaj ideoj, kiujn ni provis reliefigi en la aranĝo. Kuntenan ŝnuron provizis unu longa sendita eseo, sekvebla per la komencaj majuskloj, poezie ideriĉa se ne ĉiam facila. La identecon de la aŭtoroj — pli ol dek — ni malkaŝos nur fine de la peco.

MAURO Nervi notis, ne akre sed diagnoze, ke “ŝtalo/ kaj plasto premsufokas nian junon”. Ĉe la plasta Roterdamo, mildigas tiun konstaton la fakto, ke la strategian Roterdamon, la pordegon de Eŭropo, la dua mondmilito plejparte forbombis, kaj do la bezono postmilite rekonstrui tuj uzeblan havenurbon devigis haste kunfliki kion ajn la senĝojaj arkitektoj kapablis. Tial la iom strasan nunaĵon de la urbo oni devas legi kun historia komprenemo.

*Ĉu oni povas fari ankaŭ tion?
Vivantan urbon bati per la bomboj?
La domojn homloĝatajn igi tomboj
flamantaj? Jes. Ĉu la milito-dion
vi do ne konas? Ĉu la tragedion
hispanan vi forgesis? Ties ombroj
ĵetiĝas sur la mondon. La kolomboj
de l'murdo tie lernis la metion.
Guernica, urbo de martira famo,
mesaĝas al martira Roterdamo:
“Mi vidis, kaj suferis ĉi sovaĝon!
Ne distretita en la frua ĝermo,
nutrita eĉ, eskapis ree kaĝon
la monstro de detruo kaj ekstermo.”*

Vizitante “indiĝenojn” en Roterdamo, mi en du apartaj hejmoj vidis la saman artaĵon, kiu montras grandan parton de la urbo. Ĝi estis kreita de alta vidloko, eble de la urbo-doma turo, nur kelkajn tagojn antaŭ la bomba detruo. La tordita viro kun malplena brusto — skulptaĵo de Zadkine “Urbo sen koro” — tre trafe simbolas la ĝisfunde vunditan havenurbon. Sed dum mia restado tie mi povis konstati, ke el la ruinoj nova, forta kaj varma koro evoluis.

Roterdamo lasis en mi impreson pri urbo inter du mondoj: samtempe trankvila provinca urbeto kaj moderna metropolo. Urbo, en kiu kunvivas biciklo, loĝboato, futurismaj arkitekturoj kaj ĵus-elpensitaj teknologioj. Mi ne scias, ĉu modernaj negativaj tendencoj sukcesis iel degradi la fizionomion de Roterdamo, sed mi certas ke pozitive

protektas ĝin la fakto, ke ĝi situas en lando eminente pejzaĝa, kie la konservado de artaj, naturaj kaj homaj valoroj estas nacia kulto.

ALIFLANKE, Nervi restas prava, ke “ĉion ni konstruis/senpripense”, kaj ke la tujeco kaj straseco de la haste urbaj rubaĵoj efektive “premsufokas nian junon”, kiu postulas, ke ni maturiĝu, por ke venontfoje ni scipovu kreski june kaj kreskigi junige. La parkoj, la tramoj, la butikoj “Abelujo” de Roterdamo, kaj la neestingeblo kamarademo en la CO de la “pacaj laborantoj” estis feliĉaj signoj, ke la procezo de tiu maturiĝo komenciĝis longe, kviete kaj fortike.

Nenie en Eŭropo mi renkontis tiom buntan vivon de popoloj. Ofte mi spertis la noblecon de aliaj gastlaboristoj. En la unuaj tagoj de mia restado alparolis min viro, demandante pri io. Mi, klopodante komprenigi min diverslingve, ricevis la respondon: “Nur turk’.” Ĉar mi hazarde estis vidinta en la proksimeco la ŝildon de la turka konsulejo, mi gvidis la sinjoron al tiu domo. Neniam mi forgesos, kiel liaj ĝojo kaj dankemo fluis al mi tra liaj dikaj gantoj, kiam li manpremis ĉe nia disiĝo.

Estis ne antaŭimageble, ke en Roterdamo funkcias pli da ĉinaj restoracioj ol sufiĉe. Ke multaj roterdamanoj ŝategas manĝi krudan haringon en la bazaro ĉe Binnenrotte, tio tre surprizis min. Kaj kiam mi estis unuafoje allogita de la teraso kafejo ĉe Stadhuisplein, post agrabla butikumado ĉe Lijnbaan, mi ekkomprenis kial nederlandanoj emas pasigi horojn en la trinkejoj kaj kafejoj.

La roterdamanoj ĉesigis sian laboron en la posttagmezo kaj dum unu tuta horo intense aĉetadis en la modernaj kaj riĉaj butikoj. Poste, tramoj kaj trajnoj ilin ĉiujn rapide gluitis, kaj se vi promenus en la urbocentro post la sepa, vi aŭdus viajn paŝojn efiĝi. La roterdamanoj iris al siaj domoj, tre vertikalaj, tre malvastaj. Ĉi tiu popolo alkutimiĝis tra la epokoj al alta taksado kaj atenta ŝparemo de la

vivospaco. Cetere, jarcentoj da toleremo kaj da alta socia civilizacio instruis al ili ĝeni unu la alian kiel eble plej malmulte. Pri la pasinta suferado atestas impona statuego kun truo en la ventro. La plej esperiga signo de estonteco estis tiam por mi kelkaj tramoj bunte kaj fantazie ornamitaj. Tiujn mi sopiras trovi.

La roterdama printempo rapide burĝonis. Mi memoras la belajn tulipojn en la idilia Het Park je distanco de dek minutoj piede de la CO. De la supro de la "Euromast" apud Het Park mi vidis la panoramon de la urbo, en kies stratoj mi ĝoje promenis dum la sep monatoj de mia restado. Ne nur en Roterdamo, sed ankaŭ en multaj aliaj urboj, vilaĝoj kaj lokoj mi spertis la unikan etoson de la Malaltaj Landoj.

Loĝinte dum jaroj aŭ monatoj de mia vivo en la plej diversaj urboj, mi trovis Roterdamon pli kvieta kaj pura ol Londono, pli interesa ol Kumasi (Ganao) aŭ Aŭklando, same internacia kiel Hamburgo, multe malpli bela ol Montekarlo sed psikologie pli tolerebla (Monako estas unu granda klaĉvilaĝo kie ĉiu konas ĉiun!); kaj mi certe konsilus al vojaĝantoj al la nunjara UK, ke ili ne timu Roterdamon: La homoj estas afablaj kaj helpemaj, la trafiko ne tro densa (kompare kun Londono aŭ Hamburgo), la hoteloj komfortaj kaj puraj (en la pli superaj klasoj, almenaŭ), kaj la elrigardo al urbo, haveno kaj ĉirkaŭaĵo de sur la "Euromast" estas unika!

Por pedanta perfektemulo kiel mi, Roterdamo montras vizaĝon de kvieta ordo en ĉio. Ĉiuj rimedoj kunlaboras por plifaciligi ĝuadon de la propra vivo.

Por drinkemulo kiel mi, la vizaĝo de Roterdamo senhonte proponas eblecojn de ĉiuj specoj: kun aŭ sen manĝaĵo, sur la trotuaro, ene de barĝo en la haveno, aŭ sub la ĉielo en la dufoje-semajnaj bazaroj.

Por kulturserĉanto kiel mi, Roterdamo montras vizaĝon de respektinda kaj pro-spertoj-lerta kolektanto de belaĵoj de ĉiuj specoj. La ĉefa orkestro de Roterdamo plene meritas sian mondfamecon. Kvankam la ĉefa biblioteko estas ankoraŭ tro nova por fanfaroni pri mondfameco, ankaŭ ĝi havas siajn meritojn, kiuj inkluzivas tre imponan kolekton de libroj en la Internacia Lingvo.

Kaj la stratoj de la urbo mezso bildigas la kulturfonon de Nederlando mem, tiu civilizacio kaj spirita kaj materia, kiun ebligis sistemaj streboj certigi, ke ĉio estas kaj restas en kvieta ordo.

TIU LOKO ESTAS haveno, kiu Eŭropon kun la oceano apudmetas, tamen ne povas ilin home renkontigi. Kaj Esperanto estas lingvo, kiu komencas la vivon kiel mariste simpla apudmeto de bazaj vorteroj de Eŭropo apud la oceano de universaliga ebleco, esperante poste plenplenumi la rolon de home havena lingvo. Kaj tiu nia kultura interpretistado, inter la milita paseo kaj postmilita ekzisto estontecen, ne devas esti verda predikado al instruendaj malsamideanoj. Ĝi bezonas preni unue la formon de matura kaj viva esprimado de la havensimbolo ene de nia komunumo. Kaj Roterdamo bele arenas tiun nian dramon; ĝi invitas, ke genia romanisto deĵoru en la CO kaj poste prifikiu la postmilitajn personecojn, kiujn unike sed mondsimbole florigas la Esperanta komunumo.



Mi legis la plendojn, la kritikojn, la mendojn. UEA faris, faros, faru. UEA fuŝis. UEA devis, devas, estos devonta helpi, savi, aranĝi, krei, gardi, kontroli, instigi, regi, iniciati, imponi. Ĉiopova, ĉioscia. Ne surprize ke mi surpriziĝis vidante la veron. Centra Oficejo, 1985. Ĥaosa pro rekonstruo. Polvo, konfuzo. Malnova maŝinaro. Manko de rimedoj. Dek du, dek tri homoj, ne ĉiuj plentempaj, faris ĉion. Reagis al plendoj, kritikoj, mendoj. Faris, fuŝis, helpis ktp. Mi ankoraŭ miras pri kiom tiu eta grupo sukcesas fari, kaj kiom profesie. Estas tre talenta grupo tie. Eble ili tro sukcesas imponi. . .

Tiu, kiu ne vizitis, nek laboris tie, tute ne povas imagi al si, kiel la oficistoj de la CO plenumas administrajn kaj teknikajn laborojn, kiel la Asocio sukcesas vivteni sin per la membrokotizoj, sen subvencio de iu ajn registaro. Mi multon lernis de miaj gekolegoj kaj en la praktiko, kaj iom konatiĝis ne nur kun la funkciado de la Asocio kaj la CO, sed ankaŭ kun la pens- kaj ag-maniero de okcidentaj samideanoj kaj la Movado en Eŭropo.

NUR RIDANTOJ kapablas persisti en tiu rutina gutado, kiu post jarcentoj almenaŭ enboros la “monton grانيتan”. Provante ridi kune, en la centroj de nia internacia aktivado, la kunridemuloj trovas, ke niaj stiloj de gajado povas kolizii, pro la diversfoneco, pri kiu nia beletro


Sube: Vizaĝoj de la Centra Oficejo — konfliktoj ne ĉiam forestis... (p.49) sed pli terurajn suferis la urbo mem.

ankoraŭ ne donas ekzistohelpaĵon komentario. Tial necesas demando, kio do faciligus la vojon al pli klarvoĉa kaj kolektiva kunridado, kiu akcelus kaj riĉigus la taktojn de la kontaktejoj — ekzemple, nia Centra Kunlaborejo en Roterdamo.

En tiu periodo mi deĝoris en la Libroservo, trafa okupo por entuziasma freŝbakita esperantisto kaj ĝenerala libroŝatanto. Mi parolis Esperanton de frumatene ĝis malfruvespere. Plejmulte, en tiuj semajnoj, mi eĉ sonĝis en Esperanto.

El la homoj de tiu epoko, iu mortis, alia pensiigis, alia serĉas la amon kaj sin mem malantaŭ neantaŭviditaj kurtenoj, alia plu dediĉas sian vivon al la proksimuloj sed ankoraŭ ne sukcesas ilin ami, alia foriris dum jaroj al la Tria Mondo kaj revenis kun nova karaktero kaj larĝa rideto, alia reprezentas la sudon en la nordo kaj pro la streĉo preskaŭ ne plu sukcesas rideti.

Efektive, la CO aspektis al mi ĉe la alveno eĉ pli griza ol Roterdamo! Por esti sincera, mi firme intencis foriri kelkajn tagojn poste. Ĉu adaptiĝi en fremda lando kies lingvon oni ne scipovas estus pli facile ol adaptiĝi en Esperanta medio sen problemo de lingvo? Jen paradokso! Povas esti, ke seniluziigo venis de la fakto ke mi naive opiniis ke en Esperantujo oni ĉiam estas kore, ĝoje kaj varme akceptita; sed tiel ne estis: Ne temis pri Esperanta rondo de malgranda klubo sed pri vera entrepreno uzanta ĉiutage Esperanton (kiun mi cetere ne bone kaptis en la komenco), kun estro



kaj administrantoj pagataj por labori por Esperanto kaj ne kelkaj bonvolemaj idealistoj. . .

Unu horon post mia alveno oni montris al mi kun gravaj mienoj kiel prepari kafon, teon kaj lakton, tiel ke mi povu tion fari la morgaŭan matenon (ĉu do tial oni dungis min?); du horojn poste oni kun ridetoj sciigis al mi, ke mi devos pristudi la staton de TEJO kaj redakti tutan raporton pri ĝi, kaj oni parenteze menciis ke la homo kiu tion devis fari, foriris — domaĝe ĉar tian laboron li estus verkinta brile kiel kutime. . . Tiuj aludoj al brila atendata laboro estis sufiĉe oftaj, kio fakte timigis min pri la rezulto! Mi sentis angoron, ĉar mi venis nek por prepari kafon nek por fari tiom vastan laboron!

ONI NE SUPOZU, ke la taskoj kaj organiza strukturo de la labora vivo estas kvazaŭ gantoj, kiuj estus tajlorendaj laŭ normaj reguloj, “senpripense”, kiel dirus Nervi. Sed. . . ĉu UEA pretas pripensi? Nu, ĝi tiel severe interpretas sian statutan neŭtralecon pri politikaj kaj sociaj demandoj, ke ĝi lasas la mikrosociajn demandojn de sia CO al la supozeble bonvola mastrumado de s-ro Hazardo. La miraklo estas, ke s-ro Hazardo, Fakdelegito pri Sociaj Demandoj, tiel malofte paneigis la rilatojn en nia tuta historio.

Multaj talentuloj foriris inter 1985 kaj nun. Mi mem restis tre mallonge, pro interhomaj konfliktiĝoj kaj malbonaj laborkondiĉoj. Kapabluloj alvenas entuziasme, idealisme kaj foriras tro rapide, senesperaj pro la sento ke ili ne sukcesos plenumi la potencialon de sia posteno. Sed mi ne volas kritiki tiun stabon, nek tiujn kiuj foriris. Mi volas kritiki la oficejajn regulojn, tradiciojn kaj gvidajn principojn kiuj preskaŭ certigas problemojn. En tia malgranda oficejo, ĉio dependas de la laborantoj. Necesas zorge serĉi, kultivi, flegi kaj gardi taŭgajn homojn.


NI ESTAS internacia movado; kie do estas la internacieco? Ĉu ĝi povas, kiel ni proponas, iĝi justa? La hierarkieco mem ne foriros per la civilizado (malplisoldatigo) de la plej fortaj nacioj: Ne nacioj, sed personoj povos lerni. Se la personoj lernos esti kaj kompreni aliajn personojn, ili evoluigos aliajn instituciajn strukturojn. UEA, laŭ siaj celoj kaj konsisto, devus fari sin lernejo de tiu plej esenca studobjekto, kaj esploro de ĝia pedagogio. Kie pli efike, ol en kaj ĉirkaŭ la CO?

Laŭ mia unujara restado en la CO, mi opinias, ke la evoluo de la Asocio en la proksima estonteco dependas grandparte de la efika funkciado kaj fruktodona laboro de la CO. Sekve tre gravas elvolvi ĝis maksimumo la aktivon kaj talenton de ĉiuj CO-anoj. Siaflanke la Estraro devas pli zorgi pri ili, ol ĝi faris ĝis nun. Ĉu ne akcepteblas, ke la Estraro kunsidu ankaŭ kun la oficistoj du horojn ekster la estrara kunsido, por informiĝi pri iliaj laboroj kaj problemoj kaj interŝanĝi opiniojn, por danki kaj kuraĝigi ilin? Eble tio ne estas okcidenta agmaniero, tamen bonvolu konsideri.

Ni ne pagas bone, kaj verŝajne neniam pagos bone. Por reteni bonajn kunlaborantojn, kaj por esti justaj, ni devas doni aliajn rekompencojn. Ni helpu al la lernantoj kleriĝi pri

Esperanto. Ni instigu ilin ĉeesti internaciajn renkontiĝojn, kaj donu tempon por tio. Ni donu pli da fleksebleco kaj pli da feritempo. Ni ne pensu pri kiom ni perdos pro tiaj rekompencoj, sed pri kiom ni gajnos, kiam postenuloj sentas ke ni estimas ilin, laboras entuziasme kaj restas pli longe.

NI PLI EKSPLOCITE repensu la naturon de nia interpersona kaj interkultura kontakt-movado, kaj niajn devojn al la lingvo, kiu animas ĝin. UEA devus klopodi, ne en sia



statuto sed en la vasta organiza vivo svarmanta ekster ĝi, evoluigi senhastan, ridipovan stilon de funkciado — plej evidente en siaj laborcentroj. Nia nova pensado kaj laŭpensa organizado devas havene ampleksi kaj preterverturi la ideon, ke ni, kiuj kune laboras kaj vivas, tiel lernas, persono de persono, kulturo de kulturo. Kiam nia CO, kaj ĝiaj pli junaj fratoj alikontinente, evoluigos oficejan kulturon mikrokosme interpreteantan la tutan Esperantujon, nur tiam nia interfunkcio vere forigos la fantomon de la politika kompromitiĝo. Ne atendu, ke ni elkorbigu “praktikajn sugestojn”: baf pri tiaj gestoj! El la metalo, kiun nia kunforĝado fandos, fluos tiaj detaloj, multe pli fideinde ol el gestoj. Fluos, jes, kiel akvo de l’ŝvarca milit-romano en la postmilitan oceanon, kiu kuracos la troan metalecon de niaj planoj. ●

Postnoto: Por la scivolemuloj, jen la aŭtoroj de la diversaj alineoj (sen la nur supraĵe gravaj devenlandoj). Ekde la vorto “MAURO”, sur p.46: Probal Daŝgupto, Kalmán Kalocsay (ja nur fantazie laborinta CO-e!), Gulli Svensson, Gian Carlo Fighiera, Daŝgupto, Svensson, Dai Songen, Giulio Cappa, Bruce Crisp, Helga Rapley, Lorens’ Mi, Daŝgupto, Derek Roff, Dai, Daŝgupto, Cappa, Sylvaine Le Magadure, Daŝgupto, Roff, Daŝgupto, Dai, Roff, Daŝgupto.



73a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Roterdamo (Nederlando), 23a — 30a de julio 1988.

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

Honora Komitato: Kvankam tiu tradicia bukedo de kongreslandaj eminentuloj ankoraŭ estas en la stato de formiĝo, la Honoran Komitaton de la 73a UK jam akceptis eniri: Prezidanto de la Parlamento, Provincestro de Suda Holando, Ministro pri Edukado kaj Sciencoj, Urbestro de Roterdamo, Nobel-premiito pri ekonomiko, Prezidanto de la Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj, Ambasadoro de Nederlando ĉe UN, kaj pluraj aliaj eminentuloj de la socia, kultura kaj scienca vivo en Nederlando. Kompleta listo aperos en la Kongresa Libro.

Kongresa Libro.

Loĝigo: Roterdamo havas amason da hoteloj, kiuj plejparte estas proksimaj al la kongresejo. Ni estas bonŝancaj ankaŭ pro la fakto, ke julio estas "ekstersezona" monato en la urbo de la plej granda monda haveno. Tio bele speguliĝas ĉe la nun pli-malpli definitivaj prezoj: en altkategoriaj hoteloj (Hilton, Central, Atlanta, Park, Rijn, Scandia) unulita ĉambro kun matenmanĝo kostas inter 100 kaj 125 guldenojn, dum loko en dulita ĉambro (kun matenmanĝo) kostas ĉ. 75 guldenojn. En mezkategoriaj hoteloj unulita ĉambro prezas ĉ. 85, kaj loko en dulita inter 55 kaj 70 guldenojn, ĉiam kun matenmanĝo. Pli modesta loĝebleco estas junulargastejo, kie lito kun matenmanĝo kostas 21 guldenojn. Nun estas tute certe, ke disponeblas ankaŭ komuna loĝejo por kelkaj centoj da kongresanoj, kie la prezo estos ĉ. 10 guldenoj tage. Ni rezervis lokojn ankaŭ en bela kampadejo proksima al la urbo.

Ekskursoj: Loka Kongresa Komitato preparas tutan dekon da tuttagaj ekskursoj (merkredon, la 27an de julio). La celoj de la ekskursoj estas: Amsterdamo, Hago, la fama strando Scheveningen, ŝipekskurso sur la rivero Zaan (norde de Amsterdamo), Delft, Den Bosch, Deltoekspozicio en Zelando. Ĉiuj ekskursoj inkluzivos tagmanĝon kaj kostos inter 60 kaj 80 guldenojn. Okazos ankaŭ aparta bicikla ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Gouda, kaj ĝi kostos ĉ. 40 guldenojn. Kompreneble oni planas ankaŭ duontagajn ekskursojn tra Roterdamo mem.

Vizito al entreprenoj: Novaĵo en la kongreso programo estas vizitoj al tuta aro da entreprenoj kaj instancoj: teknika universitato, komerca ĉambro, sem-kultiva komerca entrepreno, trink-akvaj instalaĵoj, urba energi-entrepreno, kontenera haveno ktp. Tiuj vizitoj estas rezervitaj unuavice por fakuloj kaj kostos ĉ. 15 guldenojn.

Antaŭkongreso: La oficiala antaŭkongreso okazos de la 16a ĝis la 23a de julio en la plej sudorienta angulo de Nederlando, fakte ĉe la triangulo kie renkontiĝas Nederlando, Germanio kaj Belgio. La loko estas rave bela kaj ebligas vaste ekskursi tra tri landoj. Kompleta aranĝo, inkluzive ĉiujn manĝojn kaj ekskursojn kostas 850 guldenojn. Aliĝilo distribuiĝos kun la Dua Bulteno, sed estas havebla ankaŭ aparte de la CO. Krome, estas planata aparta kvartaga promenado en la ĉirkaŭaĵo de Nimego

(orienta Nederlando) de la 18a ĝis la 22a de julio. Ankaŭ pri tio vi trovos mendilon en la Dua Bulteno.

Postkongreso: Ĝi okazos de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en Alkmaar (nordokcidente de Amsterdamo). Alkmaar estas malnova pitoreska urbeto kun mondfama fromaĝbazono, mezepokaj stratetoj kaj kanaloj. Oni loĝos en luksa motelo kaj ĉiutage ekskursos al unu el la plej famaj turismaj lokoj en Nederlando: Amsterdam, Enkhuizen, Volendam, Merken ktp. Prezo de kompleta aranĝo surbaze de dulitaj ĉambroj: 825 gld. Aliĝilo kaj aliaj detaloj haveblas de la CO de UEA kaj estos aldonitaj al la Dua Bulteno.

LKK planas ankaŭ du aliajn postkongresajn ekskursojn: unu havos ornitologian karakteron kaj okazos en la insulo Texel, dum alia rilatos al trankvila trarigardo de la plej famaj nederlandaj arto-muzeoj.

Foiro: Laŭ ideo de s-ro R. Randrianekena el Madagaskaro, LKK planas organizi foiron en parto de la kongresejo, por tiamaniere animi la etoson de la Kongreso kaj finance subteni kongresanojn el landoj kun pagaj malfacilaĵoj. Ni do imagas, ke temos pri iaspeca bazaro, kie unuopaj kongresanoj vendos jen hejmlandajn memoraĵojn kaj produktojn, jen varbos por siaj eldonaĵoj aŭ aranĝoj, iuj eble muzikos kaj kantos tie, aliaj vendos filatelaĵojn, pliaj instruos paperfaldadon, kudradon, brodadon... Nek la Kongreso nek UEA volas profiti el tiu foiro, sed ĝi servu al tiuj, kiuj bezonas malgrandan financan subtenon. Interesitoj prefere skribu al la CO pri sia intenco (kaj planoj) partopreni la foiron.

Glumarko: Iom malfrue, sed ĝi ja aperis: vigla, plurkolora (blua, verda, ruĝa, nigra) mapo de la kongresa urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Dek memgluaj folioj, ĉiu kun dek glumarkoj, kostas 18,00 (por Nederlando 21,60) guldenojn. Kutima triona rabato ĉe mendoj ekde 30 folioj. La prezo inkluzivas la afrankon. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Brokantaj libroj: Se vi disponas pri duoblaĵoj aŭ aliaj nebezonataj Esperantaj libroj, utiligu la okazon, ke la Kongreso okazas en la urbo de UEA kaj kunportu (aŭ anticipe sendu) ilin al Roterdamo. La plej valorajn librojn (kaj aliajn Esperantaĵojn) ni aŭkcios dum la Kongreso favore al iu el la bonfaraj celoj en la agado de UEA. Aliajn ni vendos samcele en aparta fako de la Kongresa Libroservo. Iujn ni sendos al triamondaj landoj, kie oni sopiras havi kian ajn Esperantan literaturon.

Infana Kongreseto: Ĝi okazos samtempe kun la 73a UK en pitoreska kaj komforta skolta centro en antaŭurbo de Roterdamo. La Kongreson gvidos sperta internacia teamo de geinstruistoj. Kompleta programo, kun tranoktoj, manĝoj, ekskursoj ktp. kostas nur 150 guldenojn. Rajtas partopreni infanoj flue parolantaj Esperanton en la aĝo de 6 ĝis 13 jaroj. Aliĝiloj haveblas ĉe la CO.

Statistiko: Ĝis la 20a de februaro jam aliĝis 1344 kongresanoj el 54 landoj. Tio aŭguras kongreson de ĉ. 2500 partoprenantoj.

Pliaj detaloj pri la ĉi-subaj aranĝoj estas ofte, sed ne ĉiam, haveblaj ankaŭ de la Centra Oficejo (tel. 436 10 44/Mark Fettes)


Daŭre: **BET "Esperantotur"**, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapest, Hungario

Marto

- 11-13: **Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo**, Leipzig, Germana DR (Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER '88, Käthe Kollwitz-Strasse 115, DDR-7010 Leipzig; temo "Homo kaj scienc-teknika revolucio")
- 14 - majo 06: **Oksemajna kurso por progresantoj**, Karlskoga folkhögskola, Svedio (Karlskoga folkhögskola, S-691 24 Karlskoga, Svedio)
- 21-27: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 25-27: **83a Skota Esperanto-Kongreso**, Cupar (Fife), Skotlando (A.R. Mollinson, 6 Rosemarkie Crescent, Broughty Ferry, Dundee DD5 2RQ, Britio)
- 25-27: **Konferenco de SAT en Britio**, Swanwick, Anglio (SATEB, 29 Farrance Rd., Romford, Essex RM6 6EB)
- 25-27: **Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco**, Sacramento (Kalifornio), Usono (John Mathews, Box 60860, Sacramento CA 95860; temo "Kiel Esperanto povas helpi la lernejojn de Kalifornio pri iliaj lingvo-problemoj?")
- 28-31: **Seminario "Kulturkomunumo Eŭropo"**, Bad Marienberg, FR Germanio (GEJ-seminario, Rainer Heckhausen, Waldenburger Str. 3, D-7149 Freiberg/Neckar)
- 29-05: **4a Printempa Semajno Internacia**, montaro Eifel, FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde)
- 30-05: **12a Internacia Junulara Festivalo**, Castiglione, Italio (Anna Cosenza, via Diaz 14, I-34170 Gorizia (GO); temo "De Odiseo al kosmoŝipoj: esplorado de novaj mondoj")
- 31-04: **HEJS-Tendaro**, Monistrol de Monserrat, Hispanio (Hispana Esperantista Junulara Societo, Sol 75, E-41003 Sevilla)

Aprilo

- 01-03: **Internacia seminario pri la Zagreba metodo**, Zagreb-Sljeme, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
- 01-04: **Brita Kongreso de Esperanto**, Bridlington, Britio (A.B. Duerden, 1 Grove House Drive, Bradford BD2 4DS)
- 01-04: **NEJ-Renkontiĝo**, Elahuizen, Nederlando (Arjen-Sjoerd de Vries, De Bongerd 8, NL-9801 AS Zuidhorn)
- 02-04: **La montaro Ĵuraso ekprintempe (promenadoj)**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 03-09: **Instrumetodoj; Internacia Renkonto de Infanoj**, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 04-09: **1-a Seminario pri Homaranismaj Esploroj**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando; kaj **Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj**, KCE (adreso supre)
- 05-10: **6a TEJO-PSEK seminario por aktivuloj**, Varsovio, Pollando (Pola Studenta Esperanto-Komitato, ul. Ordnycka 9, PL-00-950 Varsovio; temo "edukado")
- 08-10: **Renkontiĝo de Verduloj Esperantistaj**, Antverpeno, Belgio (AVE, St Columba's College, Dublin 16, Irlando)
- 18-23: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 19-24: **"Interliber"** (vendo-ekspozicio de E-libroj ĉe la Zagreba foiro), Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
- 22-24: **Trilanda Renkontiĝo**, Limburgo, Belgio (M. kaj W. Grella, 16 rue de la Colline, B-4840 Welkenraedt)
- 23-24: **Dana Jarkongreso**, Naestved, Danlando (Esperanto-Unuiĝo de Naestved, Fyrrevaenget 4, DK-4700 Naestved)
- 23-24: **Studa semajnfino**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 27-01: **16a Scienca interlingvistika Simpozio**, Varsovio, Pollando (Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa; temo "Lingvo-komunikado kaj lingvo-planado")
- 29-01: **11-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado**, Budapeŝto, Hungario (Esperanto-sekcio de "Express", Pf. 567, H-1395 Budapest)
- 30-02: **Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo**, Plovdiv, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)



**INTERNACIA
ESPERANTO
KURSEJO**



"Matene lerni, posttagmeze ferii" — sub tiu devizo IEK-Pisanica daŭrigas sian edukan tradicion, indan je la landa movado kiu gajnis la Trofeon Fyne 1987 pro rimarkinda organiza forto.

Majo

- 01-03: **14-a Unuamaja Renkontiĝo** de Jugoslavio Esperanto-Junularo, Teslić, Jugoslavio (URJEJ, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 02-08: **Sanmarina Universitata Sesio pri Morfosciencoj**, Krynica, Pollando (Esperanto-Kraków, skrytka 519, PL-30-960 Kraków 1; ld. 15 marto)
- 03-05: **21-a Tutlanda Kunloĝado**, Izunagaoka, Sizuoka-ken, Japanio (Esperanto-Domo, Tōkyō-to, Sibuya-ku, Yoyogisan-tyōme 46-17, Sone-biru-502, 151 Japanio)
- 05-08: **Internacia seminario pri mediprotektado**, Białowieża, Pollando (Jacek Plis, ul. Tokarskiego 1, DS 3 p.1411, PL-30-065 Kraków)
- 07-08: **16a Renkonto de Sileziaj Esperantistoj**, Opole, Pollando (Polski Związek Esperantystów, skr. poczt. 405, PL-45-076 Opole)
- 13-15: **Seminario "Kiel eduki la sociojn en la spirito de paco"**, Toruń, Pollando (Pola Studenta Esperanto-Komitato, ul. Ordnycka 9, PL-00-950 Varsovio)
- 14-15: **Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista**, Borovo, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 20-22: **Kultura festivalo de E-junularo**, Kumrovec, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
- 20-24: **80a Franca Kongreso de Esperanto**, Rouen, Francio (UFE Kongresa Servo, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 21-23: **2a Studa Semajnfino pri Arbaro**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 23-28: **4a Seminario pri la Nomoj de Sovaĝaj Plantoj**, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)
- 26-29: **25a Pola Esperanto-Kongreso**, Świdnica, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)
- 27-31: **8a Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj revolucia poezio**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 28-29: **Amika Kebekia Renkontiĝo**, en natura medio apud Montrealo, Kanado (Esperanto-Societo Kebekia, CP 126, succ. Beaubien, Montréal, Québec, Kanado H2G 3C8; temo "vojaĝoj")
- 29-04: **11-a Ĉebalta Esperantista Printempo**, Koszalin, Pollando (Koszalińskie Towarzystwo Społeczno-Kulturalne, ul. Zwyciestwa 126, PL-75-950 Koszalin; ld. 30 aprilo)

Junio

- 04-05: **36a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo**, Takatuki, Japanio (Yosikazu Takeuti, Takatuki-si, Zyosaityo 6-15, 569 Japanio)
- 04-10: **40a IFEF-Kongreso**, Perpignan, Francio (40a IFEF-Kongreso, 1 bis, rue d'Athènes, F-75009 Paris)
- 10-12: **Forumo de la Esperanto-Kulturo**, Varsovio, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)
- 14-29: **Internacia Amika Renkonto**, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 21-27: **4a Junpionira Esperanto-Somero**, montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (JES, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 24-26: **4a Venezuela Esperanto-Renkontiĝo**, Karakaso, Venezuelo (VEA, Apartado 47675, Caracas 1041A)
- 25: **5a Esperanto-Eisteddfod**, Dorking, Anglio (Donald Law, 61 Roof of the World, Box Hill Rd., Tadworth, Surrey KT20 7JP)
- 25-07: **Familia Esperanto-Tendaro Naturista**, Délegyháza, Hungario (Ekonomikista Grupo de HEA, Pf. 93, H-1368 Budapest)

- 27-15: **19a Somera Esperanto-Kursaro**, Ŝtata Universitato San Francisco, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010)
- 29-02: **Somera kurso**, Karlskoga folkhögskola, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, S-691 24 Karlskoga, Svedio)
- 29-13: **1-a Intensa Pedagogia-Didakta Kurso**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)

Julio

- 01-10: **9a Somera Esperanto-Lernejo**, Stambulčić, Jugoslavio (SEL, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 01-20: **Internaciaj Esperanto-kursoj**, Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 01-29: **"Muelejo de Metilernantoj"**, Cheniers, Francio (Muelejo de Piot, F-23220 Cheniers; laborrestado por esperantistoj 18- ĝis 25-jaraj)
- 02-03: **11-aj Someraj Tagoj**, Källkullen, Kimito (Kemiö), Finnlando (FEJO, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 Helsinki)
- 02-15: **Cseh-seminario — prelegoj kaj kursoj**, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 04-13: **21a Internacia Renkontiĝo Naturamika**, Pécs, Hungario (IREN, Departementa Komitato de HEA, Pf.2, H-7601 Pécs)
- 10-16: **Internacia Junulara Semajno**, Szeged, Hungario (HEJ, Pk. 193, H-1368 Budapest)
- 11-15: **24a Brazila Kongreso de Esperanto**, Maceió, Brazilo (Alagoana Asocio de Esperanto, Pk. 796, 57.001 Maceió AL)
- 11-18: **KELI-Kongreso**, Jyväskylä, Finnlando (Marjatta Linjama, Hietatie 1, SF-40530 Jyväskylä)
- 14-18: **48a Hispana Kongreso de Esperanto**, Valencio, Hispanio (Grupo Esperanto de Valencia, G.V. Fernando el Católico, 45-3a, E-46008 Valencia)
- 15-20: **36a ELNA-Kongreso**, San Diego (Kalifornio), Usono (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 15-22: **44a Internacia Junulara Kongreso**, Zagreb, Jugoslavio (LKK de la 44a IJK, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb; aŭ ĉe UEA/TEJO)
kaj samloke: **Internacia Scienca Kolokvo "Komunikado en la 21-a jarcento"**, informoj ĉe la jugoslavio adreso
- 15-24: **Ŝakfestivalo "Târgoviște-88"**, Târgoviște, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 15-29: **Turista piedmarŝo tra montaro**, montaro Pirin, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 16-22: **6a Internacia Somera Esperanto-Universitato**, Veliko Târnovo, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 16-23: **22a Internacia Konferenco de ILEI**, Kerkrade, Nederlando (Mila v.d. Horst-Kolinska, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag)
- 16-23: **Antaŭkongreso de la 73a UK**, Epen (Limburgo), Nederlando (Els Kervers-van Tholen, Tienbundersweg 38, NL-6321 CR Wijlre)
- 16-29: **"Lernu kaj praktiku"**, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 16-08 aŭgusto: **Akupunktura kurso en Esperanto**, Pekino, (Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Akademia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing)
- 17-06 aŭgusto: **Internacia Junulara Laborbrigado**, Sarajevo, Jugoslavio (IJLB, Savez za esperanto BIH, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)
- 22-24: **4a Danuba Esperanto-Renkontiĝo**, Esperanto-insulo (Orjahovo), Bulgario (E-societo "Georgi Stanev", str. Sofijska 14, BG-3300 Orjahovo)

- 23-30: **73a Universala Kongreso de Esperanto**, Roterdamo, Nederlando (73a UK, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam)
- 23-30: **Jugoslaviaj vojaĝoj** por ĉeestintoj de la 44a IJK en Zagrebo (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb: anoncu vin ĝis 15 majo)
- 24-31: **25a Balta Esperanto-Tendaro**, Tallinn (Estonia SSR), Sovetunio (Endel Ojasild, Pk. 24, SU-200090 Tallinn 90; ld. 1 aprilo)
- 25-30: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 27-09: **Internaciaj Esperanto-kursoj por lernejoj**, Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 30-05: **"Ĉu verki Valane?"** sub gvido de Claude Piron, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 30-06: **Turisma Esperanto-Kongreso**, Alkmaar, Nederlando (Turisma Esperanto-Kongreso, Pk. 8188, NL-1802 KD Alkmaar; postkongreso de la 73a UK)
- 30-06: **Internacia Esperanto-Konferenco**, Metz, Francio (Madeleine de Zilah, 39 rue de Joseph Hénot, F-57070 Metz; temo "Internacia kaj naciaj kulturoj sojle de la dua jarcento")
- 30-06: **56a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**, Vught, Nederlando (N. Reinders, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk)
- 31-07: **Internacia Ferio-Semajno de TANEF** (Naturamiko), Burgberg/Allgäu, FR Germanio (Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8902 Neusäss)

Aŭgusto

- 01-06: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 01-20: **Internacia junulara Esperanto-laborbrigado**, Sâdievo, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 01-27: **Internacia junulara Esperanto-laborbrigado**, Pleven, Bulgario (Bulgario Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 01-29: **"Muelejo de Metilernantoj"**, Cheniers, Francio (Muelejo de Piot, F-23220 Cheniers; laborrestado por esperantistoj 18- ĝis 25-jaraj)
- 03-05: **"Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko"**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Juraj Britka, Velká Okružná 28, CS-010 01 Žilina; kadrotemo "raciigo")
- 06-12: **10aj Turismaj Tagoj**, Žilina, Ĉeĥoslovakio (Juraj Gondžúr, Levočska 3, CS-010 08 Žilina)
- 06-12: **Intensaj Esperanto-kursoj**, Barlaston, Anglio (Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG)
- 06-13: **61a SAT-Kongreso**, Campos do Jordão, Brazilo (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, F-75020 Paris, Francio)
- 06-13: **10a Somera Studenta Esperanto-Renkontiĝo**, Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UMK, ul. Moniuszki 16/20, PL-87-100 Toruń)
- 06-29: **Somera Lernejo**, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 08-13: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 10-16: **2a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**, Pekino, Ĉinio (Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing)
- 10-30: **Internaciaj Esperanto-kursoj por instruistoj**, Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 13-27: **Lernejo de la pola kulturo**, Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, ul. Moniuszki 16/20,

PL-87-100 Toruń)

- 15-17: **"Struktura kaj sociolingvistika esploro de Esperanto"**, Budapeŝto, Hungario (SSEE, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 18-19: **"New Directions in Machine Translation"** (Novaj direktoj en maŝina tradukado), Budapeŝto, Hungario (nur anglalingva; John van Neumann Society, Báthori u. 16, H-1054 Budapest; kunorganizas BSO, kies per-Esperanta DLT-projekto estos unu el la fokuso)
- 13-22: **Turista piedmarŝo tra montaro**, montaro Pirin, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 15-20: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 17-31: **Internacia Danuba Remado**, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 18-21: **Kultura Esperanto-Festivalo**, Lund, Svedio (Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm)
- 22-27: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 25-31: **21a Pupteatra Internacia Festivalo**, Zagreb, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
- 26-28: **4a Flandra Kongreso de Esperanto**, Gent, Belgio (E-Kongreso 1988, Peter Benoitlaan 117, B-9219 Gent-Gentbrugge)
- 26-02: **59a Itala Kongreso de Esperanto**, Benevento, Italio (D-ro Antonio Balzerano, C-so Vittorio Emanuele III, pal. INA 39, I-82100 Benevento)
- 27-03: **Somera Esperantista Ripoztendaro**, Recz, Pollando (SERT, ul. Szpitalna 1/40, PL-85-826 Bydgoszcz)
- 27-05: **5a Sanmarina Universitata Sesio**, San Marino (Sekretario de AIS, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn)
- 29-21 okt.: **Oksemajna kurso por komencantoj**, Karlskoga folkhögskola, Svedio (Karlskoga folkhögskola, S-691 24 Karlskoga, Svedio)

Septembro

- 02-08: **Seminario por terminologoj-esperantistoj**, Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 11-20: **Aŭstralia-Pacifika Kongreso**, Brisbane, Aŭstralio (Pk. 313, Sunnybank, 4109 Aŭstralio)
- 18-19: **Migrada semajnfino**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 18-28: **Seminario-ripozo "Tra arbaroj kaj kamparoj"**, Velingrad, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)
- 19-24: **Esperanto-staĝo**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 23-25: **Skota Aŭtuna Semajnfino**, Dunblane, Skotlando (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE)
- 24-25: **Studsemajnfino**, Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, adreso supre)
- 26-02: **Internacia junulara Esperanto-seminario**, Pisanica, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

Oktobro

- 04-06: **Scienca-Teknika Konferenco**, Pardubice, Ĉeĥoslovakio (Fervoja Esplorinstituto, u. Luzickeho seminare 3, CS-118 57 Praha 1)
- 07-09: **32a Jarkunveno de Germana Esperantista Fervojista Asocio**, Kaiserslautern, FR Germanio (A. Haupenthal, Brennender-Berg-Str. 26, D-6603 Sulzbach)
- 11-15: **2a Internacia festivalo de esperantistoj-filmistoj kaj -fotistoj**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 14-15: **7a Medicina Konferenco**, Bankja, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

Laste aperis...

Eterna neologisma diskuto, La: Kalocsay kaj la sekvo, Herbert Mayer. Vieno: Krammer, 1987. 26p. 21cm. Kriterioj por la akceptebleco de neologismoj. Prezo: 9,30 gld.

Interkonatiĝu ni/Hajde da se upoznamo, Kosta Kuzman. El la serba trad. Boriša Miličević. 6p. 21cm. Ilus. Porinfana poemo pri la transirado de strato (dulingve). Prezo: 0,60 gld.

Kantiko de l' kreitaĵoj, Francisko de Asizo (ĉ.1182-1226). El la itala trad. Teafilo van der Voort. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj (16), 1987. 12p. 21cm. Mimeo. Unu el la plej malnovaj kristanismaj tekstoj en la itala (kiu aperas paralele). Prezo: 1,50 gld.

Lukio aŭ Azeno, Lukiano (ĉ.120-ĉ.180 p.K.). El la helena trad. Gerrit Berveling. Vlaardingen: Vlardingenaĵoj Kajeroj (4), 1988. 40p. 21cm. Mimeo. Humura rakonto pri homo transformita en azenon; kun informriĉa enkonduko. Prezo: 5,40 gld.

Mały słownik polsko-esperancki/Malgranda vortaro pola-Esperanta, Kazimierz Tyminski. Varsovio: Wiedza Powszechna, 1986. 431p. 14cm. ISBN 83-214-0326-3. Unudirekta. Prezo: 12,00 gld.

Mistera lumo, Julian Modest. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 90p. 20cm. ISBN 963-571-188-3. Mallongaj, trankvilstilaj noveloj pri ordinaraĵoj homoj. Prezo: 12,00 gld.

Muzeo komunuma de Xhoris, La, Freddy Bosmans. Lieĝo: la aŭtoro, 1984. 61p. 21cm. Ilus. Plejparte franclingva gvidilo, kun Esperantaj glosoj. Prezo: 12,00 gld.

Nigra insulo, La (1956), Hergé (Georges Rémi, 1907-1983). El la franca trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. Bildlibro. ISBN 2-907120-01-8. Misteraj okazaĵoj venigas la aventureman Tinĉjon al sinistra skota insulo. Prezo: 16,50 gld.

Nouveau cours d'espéranto, Edmond Ludwig kaj Renée Triolle. Madrid: Heroldo de Esperanto, 1986. 194p. 21cm. Aŭtodiakta metodo por franclingvanoj. Prezo: 17,10 gld.

Officiële situatie van het Esperanto onderricht in de wereld (1985), Germain Pirlot (1943). El Esperanto en la flandran. Wilrijk: Sonorilo, 1985. 36p. Grafikaĵo. 21cm. Prezo: 7,50 gld.

Okuloj estas fenestro de l' koro/Oĉi su prozor srca, elektis kaj elserbigis Slobodan M. Mitrović el la kolekto de Vuk Stefanović Karagić (1787-1864). Novi Sad: Petar Stojanović, 1987. 41p. 20cm. Ilus. Cent proverboj, dulingve. Prezo: 4,50 gld.

Pandemonio, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1987. 102p. 17cm. Mimeo. ISBN 950-43-1445-0. Diversformaj meditaĵoj pri la vivo. Prezo: 9,00 gld.

Praktika kurso de Esperanto, Hannah kaj Andrzej Pettyn. Warszawa: Ritmo, 1986. La kompleto entenas du librojn (po 220 paĝoj) kaj kvar sonkasedojn. Celita por pollingvanoj. Prezo: 48,00 gld.

Prepozicioj en Esperanto, La, Zhou Guangzhi. Chongqing: Sciencaj-Teknikaj Dokumentoj, 1986. 354p. 19cm. Detala ĉinlingva gramatiko, kun multaj ekzemploj. Prezo: 7,50 gld.

Présentation de l'espéranto, Emmanuel Companyns. Paris: Cours et Études de Linguistique Contrastive et Appliquée de Vincennes, 1984. 58p. 21cm. Lingvistika kursenkonduko plus dulingva resumo de rondtabla diskuto. Prezo: 6,60 gld.

Puphejmo (1879), Henrik Ibsen (1826-1906). El la norvega trad. Odd Tangerud. Hokksund: la tradukinto, 1987. 57p. 24cm. ISBN 82-991075-2-0. Fama norvega dramo, pri virino kaptita en sufoka geedziĝo. Prezo: 24,60 gld.

Rabeno de Bacherbach, La, Heinrich Heine (1797-1856). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Dusseldorf: Heinrich-Heine-Gesellschaft, 1985. 42p. 21cm. Malklasika traduko de fragmenta romano pri la sorto de la judoj en mezepoka Germanio. Prezo: 12,60 gld.

Rekomendoj X.24, V.24, V.28 kaj V.35 de CCITT, trad. Christian Bertin. Cesson-Sévigné: la tradukinto, 1987. 58p.

21cm. Normoj de la Internacia Telegrafio kaj Telefonia Konsultiga Komitato. Prezo: 8,10 gld.

SeKELipoetas, div. aŭtoroj. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj (15), 1987. 48p. 21cm. Diversstilaj poemoj el Kristana Esperantista Ligo Internacia. Prezo: 6,00 gld.



Sepdek-sep ŝlosiloj por la japana civilizacio (1985), Tadeo Umesao k.a. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Tokio: Japana Komisiono por la Centjara Jubileo de Esperanto, 1987. 353p. 18cm. Ampleksa eseetaro kompilita de renoma etnologo-esperantisto, kiu priskribas la historion kaj kulturon de Japanio; en modele flua traduko. Prezo: 24,30 gld.

Diversaĵoj

Baza Cseh-kurso: Komplete de help-materialo por instruisto. Hago: Internacia Esperanto-Instituto (dato neindikita). Libretoj, afiŝoj k.s., por uzo kun la libro *Baza Cseh-kurso*. Prezo: 15,00 gld.

Baza Cseh-kurso: Komplete por komencanto. Hago: Internacia Esperanto-Instituto (dato neindikita). Libretoj, afiŝoj k.s., por uzo kun la libro *Baza Cseh-kurso*. Prezo: 15,00 gld.

Domiling 1-7. Hungara domludo, kie la supra faco de ĉiu tabuleto portas unuflanke koloran bildon kaj aliflanke la Esperantan nomon de bildo sur alia tabuleto; la celo estas kunligi ilin en ĉenon. Ĉiu kompleto pritraktas propran temon: 1, Oftaj substantivoj; 2, hejme; 3, bestoj; 4, en lernejo; 5, distraĵoj; 6, manĝaĵoj, trinkaĵoj, plantoj; 7, verboj. Klarigoj en la hungara, la angla kaj Esperanto. Prezo: po 15,00 gld.



Nia porinfana kulturo tamen evoluas: dua Tinĉjo-libro kaj instrua domludo.

Filatelo: Poŝtmark-paro, Aŭstrio 1949 kaj 1954. La du oficialaj aŭstriaĵoj E-poŝtmarkoj (kiel kompleto), plus urboprospekto pri Vieno (1987). Prezo: 8,70 gld.

Kasedo: Esperanto programita, Hermann Behrmann. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987 (neindikita). Por uzo kun la samnoma lernolibro. Prezo: 9,00 gld.

Kasedo: Jen la viv', Roman Bura. Antverpeno: Studio Drubbel, 1987. 60-minuta. Originalaj kantoj de populara kantisto-gitaristo; kun tekstoj. Prezo: 18,00 gld.

Kasedo: Polaj kristnaskaj kantoj, Esperantista koruso "Muzilo". Varsovio: Muzilo, 1987. 60-minuta. Prezo (inkluzive de 12-paĝa tekstlibreto): 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Eĉ tio ne sufiĉas . . .

Vi tute prave respondis la leteron de s-ro J. A. Cox (Britio) en via n-ro 982. Aldone, mi ŝatus memori s-ron Cox ke, dum la minimuma salajro de laboristoj en Britio aŭ kontinenta Eŭropo estas ĉirkaŭ US\$1000 monate, en Brazilo la plejparto de la laboristoj ricevas malpli ol US\$100 monate. Tiamaniere, la kotizo de 70 gld. petata de brazilaj aliĝontoj al la 73a UK estas sufiĉe pli peza por ni ol tiu de 140 gld. postulata al tiuj de grupo B.

Mi konkludas, ke tiu sinteno de UEA estas vera elpruvo de ĝiaj neŭtraleco kaj klopodo por justeco.

Jason Gonçalves de Lima (Brazilo)

Por povi vojaĝi al kongreso okcidenten polo devus aĉeti sur la nigra merkato “malmolan” valuton (unu dolaro = 1200 ĝis 1400 zlotoj) per sia meza salajro de 28000 zlotoj, pro kio oni cetere povas ricevi prizonpunon. Poste oni devas fondi konton en valuta banko, atendi unu jaron por povi uzi la sumon por eksterlandaj aĉetoj/vojaĝoj, pagi 60 000 zl. por aviadilvojaĝo aŭ 150 000 por trajnvojaĝo kaj feliĉe partopreni la unusemajnan kongreson. . . kaj permesi al si ekvidi s-ron Cox, kiu ĉion povas aranĝi per kelksemajna salajro. Jen la diferenco!

Multaj poloj malsatas je PIV, PAG kaj aliaj “malmolvalutaj” libroj — kion fari, se PIV kostas por ni 3 monatajn salajrojn (okcidente — unutage!).

Paweł Wimmer (Pollando)

Perfekta recenzo

Verkonfese, nur tre malofte ĝis nun eblis al mi legi tiel bonkvalitan opinion, kiel “Recenzo pri kvar renkontiĝoj” (*Esperanto* 1987/ p. 181). Space limigita, tamen esence maksimuma! Stile kaj zamenhoflingve modela! Gratulon!

Rudolf Skoruppa (FR Germanio)

Memoru Harabaĝiu

Serĉante ion en la Jarlibro 1987, mi hazarde rimarkis ke ekzistas ankoraŭ la premio Nova Talento (pokalo Henry Harabaĝiu) en la Belartaj Konkursoj de UEA.

La fakto instigis min al rememoroj . . . Henry Harabaĝiu estis la Ĝenerala Sekretario de la Rumana Esperantista Societo kaj efektive la koro de la rumana esperantista movado. Ankoraŭ juna, li kun aliaj familianoj estis inter la viktimoj de la granda bombardado okazinta en 1944 ĉe la ĉefurbo Bukureŝti. Lia fratino Ĝigi Harabaĝiu, honora membro de UEA, ekzistigis tiun premion memore al sia frato.

Jam delonge mi ne legis aŭ ion aŭdis pri partoprenantoj je tiu premio. Mi atentigas je tio, ne nur ĉar mi estas proksima al tiu admirinda esperantista familio, sed ankaŭ precipe pro la fakto ke tian eminentan esperantiston — kiel ĉiujn eminentulojn — oni devas *ne forgesi*.

S. Zalmanoviĉi (Israelo)

Red.: *Ni daŭre atentigas pri la ekzisto de la Premio Harabaĝiu (vd. ekz. Esperanto 1987/p. 220), sed ni ne ricevis sciigon pri ĝia aljuĝo dum du-tri jaroj. Espereble la ĉi-jaraj organizantoj priatentos tion!*

Problemoj de la Akademio

(Reagoj al p.209-11 en la decembra n-ro)

Al la scienca laboro (interalie pri Esperanto) apartenas (1) la esplorado kaj (2) la konkludado. El amaso da argumentoj kaj surbaze de multaj diskutoj, iuj devas tiri la konsekvencojn kaj en la malmultaj kazoj de bezono havi la lastan vorton: tiel estu! La realo de la Esperantomovado posedas tiun ĉi strukturon. La Akademio estas malgranda kaj decidrajta, dum por la sciencaj laboroj la kampo estas libera kaj vasta. . . En tiu plurisma sistemo, kreivan fortan centron en unu novstila Konsilantaro (simile al kelkaj naciaj akademioj) estus esenca eraro

pro la forigo de la libera kaj samrajta partopreno en la esplorado, kiu nun regas. Ĝia formala pozicio malaltrangigus ĉiujn nun aktivajn kunlaborantojn.

Tamen, unu ero mankas en la panoramo de la pritraktantoj de esperantologio kaj interlingvistiko. Temas pri la kontribuoj de akademi-aj kaj universitataj lingvistoj, la ekstera rekonita fakularo. Ili nun simple fermas la okulojn antaŭ fenomeno vivanta en ilia propra laborkampoj. Se la Konsilantaro proponita de Blanke konsistus el tiuj eminentuloj, ilia kunagado estus nepre bona, ankaŭ iliaj kritikoj. Nur: ili en la loko de la nuna Akademio, tio ne antaŭenhelpos Esperanton.

d-ro Werner Bormann (akademiano, FR Germanio)

La manko de spuroj pri la funkciado de la Akademio fontas rekte el manko de financaj rimedoj. La esperantistoj, ĝenerale, ne sufiĉe ofte pretas aĉeti la eldonaĵojn de la Akademio. Neniel mankas al la Akademio la talentoj kaj sindonemaj laboroj de la Akademianoj. . . Se d-ro Blanke volas starigi analizadon pri gravaj problemoj, li unue frontu tiun de la mizera ritmo de vendado inter la esperantistaro.

Lorens' Mi (Britio)

La Akademio havas moralan kaj tradicifonditan aŭtoritaton, sed ne senkondiĉan kaj realan. Tio evidentiĝis, kiam la redaktoro de ĉi tiu revuo prikomentis la publikigon de la landnomaj rekomendoj en la marta numero 1986, p.48, ke “ĝi konflikta kun kelkara tradicio ene de UEA”. Per tiuj vortoj, UEA publike anoncis sin kiel konkuranta lingvo-konsilanta institucion apud la Akademio.

La demando fine reduktiĝas al tio, ĉu la Akademio estonte povos esti utila lingvo-institucio sen la efektiva aprobo de tiu organizaĵo plej reprezentanta kaj atentata ene kaj ekstere de la komunumo, nome UEA?

Jan Sośniecki (Pollando)

Kunlaboro kun MPK — ĉu riska por nia neŭtraleco?

Leginte la decembran numeron de *Esperanto* (p.212-3) mi timas, ke UEA riskas forlasi sian ĝisnunan neŭtralecon pere de sia formala interkonsento kun la Monda Pac-Konsilio. Kial mi tiele interpretas la interkonsenton, neniuj povas esti kontraŭ la paco! Ne, sed se vi rigardas la celojn kaj principojn de MPK (*Esperanto* 1988/p.10) vi nenie trovas la nocion de libereco, ĉar la tuta programo de MPK — interpretata “socialisme” (sampaĝe) — estas klare politika kaj ligita al la orient-eŭropa koncepto de “paca kunekzistado”. Laŭ tiu koncepto oni povas ĉiam kaj ĉie akiri pacon se oni estas preta submetiĝi al la postuloj altruditaj de aliaj kaj rezigni la defendon de sia libereco.

Laŭ sia socialisma orientiĝo la Pac-Konsilio neniam direktas siajn eldirojn kaj kampanjojn kontraŭ socialismaj ŝtatoj, sed ĉiam nur kontraŭ okcidentaj landoj. Tion ĝi kompreneble rajtas kiel *ne-neŭtrala* organizaĵo. Ekz-e MPK, kiu siatempe akre atakis Usonon pro la milito en Vjetnamio, ĝis nun eĉ ne milde kritikis Sovetunion pro ĝia invado kaj 8-jara okupado de Afganio. MPK ankaŭ ne kritikis la instaladon de la sovetaj SS20-misiloj en orienta Eŭropo komence de ĉi tiu jardeko, sed ĝi faris ĉion por haltigi la “eŭro-misilojn” kiuj estis instalataj en okcidenta Eŭropo depost 1983 responde al la novaj sovetaj misiloj.

Same MPK neniam rekonis ke tiu firma respondo fare de Usono kaj okcidenta Eŭropo grandparte kontribuis al la intertraktado inter Usono kaj USSR pri la reciproka elimino de mez- kaj malplilong-distancaj raketoj.

Kompreneble ĉiu rajtas havi siajn proprajn politikajn opiniojn kaj ĉiu rajtas uzi Esperanton kaj krei ne-neŭtralajn politikajn Esperanto-organizaĵojn por konvinki aliajn homojn pri la praveco de siaj opinioj. Sed nian neŭtralan Asocion oni ne utiligu por politikaj kaj partiecaj celoj. Inter pluraj kritikindaj punktoj en la interkonsento inter UEA kaj MPK, mi ŝatus substreki n-ran 8 laŭ kiu UEA tradukos en Esperanton kaj distribuos “taŭgajn materialojn de MPK” — sendube socialisme interpretatajn. Alivorte, la laŭstatute neŭtrala UEA akceptis fariĝi pledanto por organizaĵo kun difinita politika orientiĝo.

Tiu decido estas tre bedaŭrinda, ĉar se UEA alprenos difinitan politikan koloron — ĉu socialisman, ĉu kontraŭ-socialisman, ĉu kiun ajn alian — aŭ se la ekstera mondo ekhavas la impreson ke nian Asocion regas partipolitika(j) tendenco(j), tiam nia Asocio ne plu povos sukcese progresigi Esperanton en ĉiuj mondpartoj kun iliaj malsamaj politikaj reĝimoj, tiam UEA ne plu povos resti *universala*.

Eskil Svane (Francio)

Ne, ĉar ni celadas diskutigi ĉiujn flankojn

Oni povas respondi al la letero de s-ro Svane — kiu, kiel eksdiplomato ĉe UN, ja meritas atenton — je diversaj niveloj. Tamen, plej esence estas tuj konstati, ke UEA tute ne havas la celon aliĝi al aŭ iel apogi la politikon de Monda Pac-Konsilio (kiun dekomence ni agnoskis esti neneŭtrala organizaĵo), kaj tio jam devus esti klara laŭ la vortumo de la interkonsento. Tie ja troviĝas la “nocio de libereco”, kune kun aliaj konceptoj — egaleco, demokrateco, respekto al homaj rajtoj — verŝajne aprobataj de s-ro Svane. Supozi, ke ĉiu aludo al “paco” celas iun unuflankan, partiecan interpreton truditan al UEA, simple ne estas realisme.

Pri la nepra neceso de universaleco, ĉiu membro de UEA konsentos, samkiel pri tio, ke UEA ne “fariĝu pledanto por. . . difinita politika orientiĝo”. La interkonsento efektive ne celas tion. Tiu kritikita punkto 8 estas nur praktika rekono de la fakto, ke la uzo de Esperanto fare de ne-esperantista organizaĵo postulos helpon de tiuterena spertulo: Oni devas kuraĝigi kaj konsili. Jes, oni povus pli singarde vortumi tiun ideon, ekz. “UEA trovos por MPK tradukanton kaj donos al ĝi konsilojn pri la distribuo de materialoj pri paco, kiujn UEA kaj MPK ambaŭ opinias taŭgaj.” Tiel almenaŭ mi komprenis ĝian spiriton, kaj tiel oni certe interpretos ĝin ambaŭflanke: Temas ja pri interkonsento, ne pri jura kontrakto. Ĉiukaze neniuj venus al la ideo, ke UEA distribuu sub sia nomo partiecajn materialojn — la vorto “taŭga” celas eviti ĝuste tion.

Aliflanke, atingi la uzon de Esperanto ĉe sufiĉe granda kaj influhava neregistara organizaĵo estas tre inda celo,

aparte se oni vidas ĝin kadre de evoluanta strategio de UEA rekte persvadi organizaĵojn, okupiĝantajn pri tutmondaj problemoj, ekuzi Esperanton, komence en limigita formo sed espereble pli kaj pli grandskale. Kial komenci ĉe MPK? Nu, simple ĉar la okazo prezentiĝis. Ĉar UEA volas esti konsekvence neŭtrala, ĝi ja povas sentime (kvankam singarde) pledi por Esperanto en ĉiuj forumoj; kaj ĝuste tio estos la plej efika maniero gardi sian neŭtralecon kaj celadi veran universalecon por la lingvo.


Fine — kvankam tio ne gravas por la ĉi-supraj argumentoj — mi rimarkigu, ke la politika disdivido orienta-okcidenta tiel klare skizita de s-ro Svane komencis perdi sian nigra-blankan kvaliton, aparte inter la internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Al sia venonta prezidia konferenco, marte en Prago, Monda Pac-Konsilio invitis reprezentantojn el tute ne-samideaj organizaĵoj por diskuti grandan aron da temoj: interalie la tradicie “okcidentajn”, kiel la libereco de opini-esprimo kaj de vojaĝado. Mi mem en februaro ĉeestis la konferencon pri “malamikigaj bildoj” en Ĝenevo, kiun menciis la interkonsento kun MPK; tie, anstataŭ la tradiciaj polemikoj, evidentiĝis vera emo aŭskulti unu la alian, eĉ se konkreta kunlaboro ankoraŭ ne realiĝis. Kiel unu el la ege malmultaj organizaĵoj, kiuj havas fortan popolan bazon en landoj de ĉiu speco, pli konvene UEA kontribuos al tiaj kontaktoj kaj diskutoj, ol timeme rifuzus ĉiun kontakton kun la neneŭtrala mondo. Kaj denove, ĝuste en tiaj kontaktoj troviĝas la plej grandaj ŝancoj por la Internacia Lingvo.

Mark Fettes (redaktoro de Esperanto)

● **Benino:** Benina Esperanto-Asocio festis Zamenhof-Tagon 1987 per aranĝo en la urbo Cotonou, kadre de kiu oni ankaŭ akceptis novajn membrojn por 1988. Inter tiuj (entute 21) surlokaj aliĝintoj troviĝas universitataj instruistoj pri la angla kaj la germana, poŝta inspektoro kaj direktoro de mezgrada lernejo, kio montras la kreskantan akcepton en Benino de Esperanto kiel kultura-socia movado. La programo inkluzivis prelegon pri movada organizado, filmon, ekspozicion de libroj kaj revuoj, kaj dancon.

● **Bulgario:** Ekspozicio "Esperanto en filatelo kaj bildkartoj" okazis de la 17a ĝis la 27a de decembro 1987 en la granda halo de la centra sofia fervojstacidomo. Organizanto Georgi Litov pasigis tri jarojn en la preparoj, kiuj rikoltis laŭdojn de specialistoj. Vizitis la ekspozicion kelkdek mil homoj, kiuj dum tagaj horoj ricevis informojn pri Esperanto de deĵorantoj.

● **Ĉinio:** Unika televida kurso pri Esperanto pretiĝas en la marborda urbo Qingdao. La lokaj Esperanto-asocio kaj televida stacio kunlaboras por filmi la uzon de Esperanto en diversaj ĉiutagaj situacioj, per "viglaj praktikaj interparoloj", skribas Dai Songen, kiu intencas poste proponi la kurson por internacia uzo.



● **Ebura Bordo:** Yassi Ambroise (foto, meze) kaj Kouablan Kouassi Antoine (maldekstre, kliniĝanta) deĵoris dum ses tagoj en oktobro 1987 ĉe ekspozicio en la nacia biblioteko, laŭ invito de la Ministerio pri Edukado, Sporto kaj Kulturo. Sur la foto, la Ministro pri Internaj Aferoj (meze kun okulvitroj) kaj la Ministro pri Kulturo ktp (dekstre) vizitas la lokon.

● **Francio:** Esperanto-Centro de Angers proponas turismajn informojn kaj helpon al esperantistoj vizitantaj la provincon Anjou ĉirkaŭ la rivero Loire, kie cetere situas la kulturdomo Kastelo Grésillon. Kontaktu A. Frangeul, 6 rue du Bis, La Roseraie, F-49 000 Angers.

● **Greklando:** Helena Esperanto-Asocio eldonis novan lernolibron por la Jubilea Jaro, kiu enhavas ankaŭ salutvortojn de la greka Ministro pri Kulturo, s-ino Melina Merkuri. Ĝi baldaŭ haveblas tra la Libroservo de UEA.

● **Italio:** Dank' al la klopodoj de profesia tradukisto Andrea Gabison, la Itala Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj agnoskis Esperanton kiel unu el la lingvoj, pri kiuj ĝiaj membroj povas okupiĝi profesie. Interalie tio fiksas normon por salajrata tradukado el aŭ al Esperanto: minimume po 18 000 liroj por unu paĝo, same kiel por naciaj eŭropaj lingvoj.

● **Nederlando:** La 15an de januaro okazis en Mechelen, suda Limburgo, ceremonio ĉirkaŭ la publikigo de nova kaj luksa Esperanta faldfolio pri la regiono (kie okazos la Antaŭkongreso de la 72a UK). Tiun iniciaton de s-ino Els Kellers laŭdis la urbestro, s-ro Janssen, kaj vicprezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens, en la ĉeesto de aliaj oficialaj gastoj (inkluzive kelkajn parlamentanojn) kaj multaj nederlandaj esperantistoj. La riĉe ilustrita turisma varbilo aperis en 3 000 ekzempleroj.

En novembro 1987 Esperanto-Centro Nederlanda sendis al ĉiuj 225 parlamentanoj broŝuron, kiu enhavas tekston de eksparlamentano kaj ŝtatkonsiliano K. van Rijckevorsel, eldiritan en la pasintjara nederlanda Esperanto-kongreso, plus aldonajn materialojn.

Zamenhoftage, strato en Heemskerk ricevis la nomon "Zamenhof" en vortluda aludo al la apuda "hof" (maljunulejo), Sint Agneshuis.



● **Koreio:** Junecon kaj amasecon montras ĉi tiu foto de la jubilea landkongreso.

● **Afiŝarto:** Internacia ĵurio kadre de Unesko elektis Esperantan afiŝon kiel unu el la 153 plej belaj en la mondo por 1987. Temas pri reklamilo desegnita de juna zagrebano Nenad Dogan por la pekina premiero de *Virino, kiu flustris en uragano* — soldramo pri Hasagawa Teru de Spomenka Štimec. La elektitaj afiŝoj nun rondvojaĝas la mondon en ekspozicio.

● **Ateismo:** Lastatempe fondiĝis ATEO, Ateisma Tutmonda Esperanto-Organizo, kun la celoj progresigi ateismon kaj raciisman liberpensadon inter esperantistoj kaj disvastigi Esperanton inter ateistoj. La unua prezidanto estas Ralph Dumain; informpetojn sendu al la sekretario Minerva Massen, 855 La Playa no. 458, San Francisco, CA 94121-3255, Usono.

● **Aŭtomobiloj:** La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) celas plivastigi sian agadon helpe al vojaĝantaj esperantistoj; samtempe ĝi prilaboras aŭtomobilistan terminaron. Pliajn informojn donos la sekretario, Julia Guillaume, 66 Village de Grasse, F-78810 Feucherolles, Francio.

● **Blinduloj:** En la ĉina urbo Siping, provinco Jinin, troviĝas lernejo por blindaj gejunuloj, kie de marto 1987 oni instruas ankaŭ Esperanton. La studentoj kreis Esperantan floron kiu jam kvarfoje prezentiĝis televide. Tamen mankas al ili brajlaj Esperanto-libroj kaj aliaj materialoj, kio malfaciligas la lernadon. Ĉiuspecan helpon bonvenigas s-ro Wei Shun, n-ro 62 Stalin-str., Changchun, provinco Jilin, Ĉinio.

● **Historio:** En 1987 aperis (konvene!) la unua numero de *Historiaj studoj*, nova revuo aŭspiciata de la Societo por Studo pri la Historio de Esperanto (SSHE) kaj redaktata de Katelina Halo. Nisbet, Lord, Gregor, Auld kaj Chapman kontribuis interesan artikolon. Membroj-abonoj por 1988 (5 sterlingaj pundoj) bonvenas ĉe la Sekretario, 8 Vardre View, Pentywyn Road, Deganwy, Conwy, Gwynedd LL31 9TE, Britio.

● **Filatelo:** La meksikia poŝto eldonis specialan stampon por la centa datreveno de Esperanto, la 26an de julio, kiu inkluzivis la jubilean simbolon.

Laŭ oficiala informo de la ĉeĥoslovaka Ministerio pri Telekomunikado aperos, kadre de la ĉi-jara Monda Ekspozicio de Poŝtmarkoj en Prago, poŝtmarko kun Esperanta teksto laŭ propono de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Nederlandano D. Goslinga eniris la nederlandan version de la fama Guinness-Rekordlibro, pro sia kolekto de 1364 glumarkoj, 947 bildkartoj kaj 647 poŝtostampoj uzantaj la Internacian Lingvon.



● **Instruistoj:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) laste aperigis novan varbilon pri sia agado, pere de subvencio de Eduka Fondaĵo Carson. Ekzempleroj haveblas de Grafika Centro Antverpeno, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ĉinaj esperantistoj ekkompilis kompendion pri la enlanda instruado de Esperanto en altlernejoj (ĉ. 50 nuntempe). La kompendio, kiu ricevis ŝtatan agnoskon, celos esti unueca gvidilo pri la enhavo kaj emfazo de la kursoj.

● **Likenologio:** En oktobro 1987 aperis ampleksa Suplemento de *Likenoj de okcidenta Eŭropo* (vd. *Esperanto* 1987/p.12) kiu korektas erarojn en la unua eldono kaj donas novaĵojn el la lastaj du jaroj. La Suplemento haveblas de Societo Botanika de la Mezo-okcidento, "Les Andryales", Saint André, F-17550 Dolus, Francio.

● **Planlingvoj:** La unua vortaro (1430 vortoj) de la niĝeria interlingvo "Guosa" prezentiĝis al la publiko far la federacia informministro Momoh en la Nacia Teatro en Lagos. "Guosa" estas kreita de Alex Igbinéká por roli kiel interetna planlingvo en Niĝerio, la plej multetna kaj mult-homa ŝtato de Afriko. (E. Schwarzer)

Du aliaj planlingvaj projektoj lastatempe vigletis. "Glosa", izoleca kaj bazita sur la antikva greka, starigis edukon fonduson, dum la du restantaj revuetoj de la naturalisma "Interlingua" kunfandiĝis en pli interesan, *Panorama*. "Ido" apenaŭ pluvivas.

● **Prospektoj:** Lastatempe aperis urboprospektoj pri Gent, Belgio (Dienst Toerisme, Belfortstraat 9, B-9000 Gent), Saarbrücken, FRG (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) kaj Duisburg, FRG (Stadtinformation, Königstrasse 53, Duisburg). Laŭ Constant Borremans, en marto 1987 ekzistis 21 landaj prospektoj, 29 regionaj prospektoj kaj 205 urbaj prospektoj en Esperanto.

● **Religio:** En *Nieuwe stemmen* (Novaj voĉoj), organo de la nederlanda religia-humanisma asocio "Vrije Gemeente" (Libera Komunumo), aperis artikolo en la novembra-decembra n-ro pri la religiaj pensoj de Ludoviko kaj Lidia Zamenhof. Verkis ĝin d-ro W.A. Verloren van Themaat.

La brazila ekumenisma organizaĵo Legio de Bona Volo, kiu aktivas pri diversaj sociaj helpagadoj, serĉas abonantojn por la Esperanta eldono de sia organo, *Jornal da LBV* (US\$20 por unu jaro.) Skribu al Monda Sidejo de LBV, Av. Rudge 700, Bom Retiro, CEP 01134, Sao Paulo, Brazilo.

● **Turismo:** Ĉina vojaĝagentejo "Konfido" lastatempe sendis al ni reklamilon en perfekta Esperanto. Ili proponas grupajn, individuajn aŭ familiajn vojaĝojn, diversajn lingvajn servojn inkluzive de esperantista ĉiĉerono, ktp ktp. Adreso: Beijing Shangrila Hotel, tel. Pekino 802-2704, telekso 222479 brta cn.

Vojaĝagentejo Express en Budapeŝto eldonis 16-paĝan libreton, *"Gastama Hungario"*, pri la ĉi-jaraj Esperanto-aranĝoj tiulande. Skribu al Pk. 567, H-1395 Budapest 62.

LA MEMBRARO DE UEA en 1987

Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	0	3	3	Israelo	270	71	341	Tajlando	0	2	2
Alĝerio	0	3	3	Italio	1358	258	1616	Tanzanio	0	2	2
Andoro	0	1	1	Japanio	1029	411	1440	Togo	0	4	4
Angolo	0	1	1	Jordanio	0	1	1	Tunizio	0	3	3
Argentino	272	66	338	Jugoslavio	1003	261	1264	Turkio	0	2	2
Aŭstralio	132	104	236	Kamerunio	0	1	1	Un. Arabaj			
Aŭstrio	100	55	155	Kanado	129	122	251	Emirl.	0	1	1
Bangladeŝo	0	1	1	Kolombio	30	36	66	Urugvajo	0	3	3
Belgio	892	275	1167	Kongo	0	2	2	Usono	451	428	879
Benino	0	3	3	Korea Resp.	414	57	471	Vatikano	0	1	1
Bermudo	0	1	1	Kostariko	0	3	3	Venezuelo	6	26	32
Bocvano	0	1	1	Kubo	240	47	287	Vjetnamio	0	7	7
Bolivio	0	1	1	Libio	0	1	1	Zairio	196	14	210
Brazilo	466	410	876	Luksemburgio	96	11	107	Zambio	0	1	1
Britio	828	346	1174	Madagaskaro	0	2	2	101 landoj	36351	7291	43642
Bulgario	5110	105	5215	Malajzio	0	3	3				
Centrafrika Resp.	0	3	3	Malto	45	7	52				
Ĉeĥoslovakio	3527	179	3706	Maroko	0	2	2	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA			
Ĉilio	30	13	43	Meksikio	4	23	27	MEMBRO-STATISTIKO DE UEA			
Ĉinio	1128	97	1225	Mongolio	0	2	2	POR 1986 KAJ 1987			
Danlando	214	102	316	Nederlando	303	443	746				
Dominika Resp.	0	1	1	Nepalo	0	6	6	Kategorio	1986	1987	
Ebura Bordo	0	5	5	Niĝerio	0	8	8	Membro-Gvidlibro	409	642	
Egiptio	0	1	1	Niĝerlando	0	2	2	Membro-Jarlibro	1267	1417	
Ekvadoro	0	1	1	Nikaragvo	0	5	5	Membro-Abonanto	3692	3922	
Filipinoj	0	5	5	Norvegio	333	92	425	Dumviva Membro	957	944	
Finnlando	490	255	745	Nov-Zelando	70	69	139	Honora Membro	28	30	
Francio	523	665	1188	Pakistano	0	11	11	Juna M-Jarlibro	164	192	
Gabono	0	2	2	Papuo-Novgvineo	0	1	1	Juna M-Abonanto	162	144	
Gano	0	4	4	Peruo	15	2	17	Individuaj Membroj	6679	7291	
Germana DR	400	32	432	Pollando	9118	214	9332				
Germanio FR	927	516	1443	Portugalio	132	28	160	Aligitaj membroj	24546	27046	
Greklando	367	34	401	Rumanio	0	27	27	Junaj Al. Membroj	9364	9305	
Gujano	0	1	1	Ruando	0	7	7	Membroj entute	40589	43642	
Gvatemalo	0	2	2	Senegalio	0	1	1				
Haitio	0	15	15	Singapuro	0	1	1	Societo Zamenhof	184	197	
Hinda Unio	0	20	20	Sirio	0	1	1	Abonoj <i>Esperanto</i>	233	265	
Hispanio	845	217	1062	Sovetunio	0	106	106	Kolektivaj ab. <i>Eo</i>	1175	1215	
Honkongo	0	7	7	Srilanko	0	5	5	Abonoj <i>Kontakto</i>	389	400	
Hungario	3435	202	3637	Sud-Afriko	43	21	64	Kolektivaj ab. <i>Kto</i>	1144	408	
Indonezio	0	3	3	Sudano	0	1	1	Patronoj de TEJO	72	59	
Irano	0	84	84	Svazilando	0	1	1				
Irlando	50	18	68	Svedio	1163	400	1563	Kotizoj entute	43786	46186	
Islando	47	37	84	Svislando	120	127	247				

Jubilea rekordo — sed ne ĉie

Kiel oni rajtis atendi, la membraro grave kreskis dum la Jubilea Jaro. En la kategorioj de Individuaj Membroj tio montriĝas pozitiva ankaŭ en la kernaj kategorioj, do por Membroj kun Jarlibro kaj Membroj-Abonantoj, ne nur por Membroj kun Gvidlibro. 1988 estas la tria kaj decida jaro por tiu MG-eksperimento, kaj la estraro baldaŭ diskutos, ĉu tiu kategorio daŭru. La nova sescento da Individuaj Membroj aldoniĝas tra multaj landoj. Tio signalas pli vastan, pli firman movadon. Gratulon!

Statistiko por la aligitaj membroj ankaŭ montras

grandan kreskon, sed Pollando ricevis tian impeton de la Kongreso en Varsovio, ke ekspansio tie, kaj sume, ne kaŝu la jenon: multaj landaj asocioj apenaŭ kontribuis per pli da aligitaj membroj. Vi vidos tamen, ke Kubo ekstreĉas siajn movadajn muskulojn.

Ĉe la specife junaj la movado ne furoras. Necesas tamen glosi la falon en kolektivaj abonoj al *Kontakto*. La klarigo estas, ke ni ne plu tiel kvante, kaj per interna subvencio, dissendas ĝin al la Tria Mondo.

Nu, vi mem studu la ciferojn kaj venu al propraj konkludoj. Ni volonte statistikis duobligintan membraron post kvin jaroj. Ni egale volonte liverus servojn al, kaj profitus la subtenon de tia kolegaro. **ns**

Persone

● **Dâlbokov:** Fariĝis la nova prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio eminenta politikisto kaj ekonomikisto, Sava Atanasov Dâlbokov, kiu lernis Esperanton kiel gimnaziano en la tridekaj jaroj kaj jam de kelkaj jaroj estas membro de la Centra Estraro de BEA. Dâlbokov plenumis diversajn ministrajn postenojn en la bulgara registaro de post 1957; li nun estas unua vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto.

● **Dobrzyński:** La prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, Roman Dobrzyński, gajnis la premion "Arĝenta Terglobo" 1986/7 pro sia pollingva libro *Portugalia*. La premion aljuĝas ĉiun duan jaron la pola pacrevuo *Widnokregi*, al la aŭtoro de la plej altvalora libro pri eksterlandaj temoj. Dobrzyński, vaste konata en Pollando pro siaj televidaj programoj kaj libroj, cetere ĉefaŭtoris la dokumentan filmon *Esperanto* kiu premieris ĉe la 73a UK.

● **Fighiera/Sikorska:** La internacia gazeto *Heroldo de Esperanto* translokiĝis komence de februaro al Torino, Italio, post naŭjara aperado en la hispana ĉefurbo Madrido. *Heroldo* sekvas sian redaktorinon, Ada Fighiera-Sikorska, kaj ŝian edzon Gian Carlo Fighiera, kiu frue emeritiĝis ĉe Monda Turisma Organizaĵo kaj nun reiras al sia naskiĝurbo.

● **Perez de Cuellar:** La Ĝenerala Sekretario de UN, Javier Perez de Cuellar, konfesis en decembro al la revuo de la itala flugkompanio, *Alitalia*, ke lia propra oficejo nuntempe uzas 266 interpretistojn kaj 437 tradukistojn. Poste li respondis negative al demando pri Esperanto: "Mi ne plu vidas ĝin praktika solvo. . . kaj ĉiukaze la lingvonombro ne estas vera problemo en la kadro de la internacia komunumo." Nu, verŝajne ne, se ĉiu havus 703 lingvofakulojn je sia dispono!

● **Rosbach:** En decembro 1987 Johan Hammond Rosbach ricevis la Kulturpremion de la norvega gubernio Øsfold, pro agado kiel "aŭtoro, ĵurnalist, desegnisto, fotisto kaj esperantisto". Rosbach jam delonge establis sin kiel unu el la plej maturaj prozaj talentoj en Esperanto.

Yukiko Isobe (1913-1988)

La 15an de januaro 1988 forpasis en Tokio Yukiko Isobe, veterana organizanto de la japana Esperanto-movado, dudek jarojn prezidanto de Esperantista Virina Asocio, komitatano kaj Honora Membro de UEA.

Yukiko Isobe aktivis por internaciaj kontaktoj tra la tuta vivo. Diplomiĝinta pri la anglaj lingvo kaj literaturo en 1934, ŝi laboris ĉe internaciaj organizaĵoj en Tokio, kie ŝi poste fariĝis interpretisto. De 1953 ĝis 1959 ŝi direktoris en Havajo (Usono) ĉe komerca firmao. Poste ŝi fondis la propran entreprenon en Tokio, kie ekde 1959 ĝis 1970 ŝi cetere direktis multan sian energion al la prosperigo de Japana Esperanto-Instituto (JEI).

La rimarkindaj organizaj talentoj de Isobe estis videblaj en la 50a Universala Kongreso (Tokio 1965), kie ŝi estis LKK-ano, kaj ankaŭ en ŝia elekto kiel administra direktoro de JEI en 1971 kaj ĝia ĉefdirektoro en 1979. De 1971 ĝis 1984 ŝi organizis JEI-karavanon al la UK-oj. Krom la prezidado de EVA menciita supre, ŝi estis multjara membro de la UEA-komisiono pri virina agado kaj ankaŭ aktivis en Esperantista Go-Ligo Internacia. En sia taskoplena vivo ŝi cetere trovis tempon por verki aregon da artikoloj en kaj pri Esperanto. Per la propra ekzemplo ŝi elstare kontribuis al la forigo de certa praktika seksismo en la japana kaj Esperanta kulturoj.

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bv. rigardi la kolofonon.

Kompakt-diskojn (CD) deziras interŝanĝi Stano Marček, Zvolenská 15, CS-036 01 Martin, Ĉeĥoslovakio.

Veliko Tarnovo (Bulgario) jubileos en majo: "Komenco de la E-movado en la mondo 1888-1988". Bv. sendi E-aĵojn por ekspozicio. Dankleteroj garantiataj! O. Cankova, Pk. 121, BG-5000 Veliko Tarnovo.

Leterposttagmezo 25an de marto: Centre Esperanto, Courtils 10, F-25000 Besançon, Francio. Dekjaruloj respondos.

Serĉas korespondantojn ASSARI Yao Djato, s/c K. Gatowonou, Radio-Lomé, BP 434, Lomé, Togolando.


En 1988 — 8888 adresoj. Esperantista societo "Kulturo" kompilas grandan tutmondan adresaron. Sendu adreson plus irk aŭ tri bildkartojn al Pk. 208, SU-7000 Ruse, Sovetunio.

Juna amiko 1988/1 prezentas la persan kaj litovan porinfanajn literaturojn per ekskluzivaj kontribuadoj. Abonintoj kaj novuloj — vi nun preskaŭ malfruas aboni por 1988: nur 8,40 gld. ĉe UEA kaj multaj naciaj perantoj. N-ro 88/1 ekspediĝos al vi **samtaĝe** kiel la alveno de via abono.

D-ro W. De Smet el Kalmthout (Belgio) ne plu estas en Ruando sed nun en Surinamo. Lia adreso: Albergastraat 21, Paramaribo.

Kosmologio de Marti Nus. Skribu al Harald Andersson, PL 3242, S-71 060 Grythyttan, Svedio.

Esperanto-klubo de Angers, Francio, sendis plurajn pakaĵojn de nenovaĵoj aŭ duoblaĵoj el sia biblioteko al afrikaj esperantistoj. **Aliaj kluboj faru same**, ne "anonime" sed kadre de interpersonaj transmaraj rilatoj: ne nur Afriko, sed ankaŭ Ĉinio, Vjetnamio, Haitio, Dominikana Resp. kaj aliaj landoj meritas tian sendaĵon. Por konsiloj, skribu al H. Bakker, Kastelestr. 231, 1082 EG Amsterdam (pri Afriko), aŭ al R. Moerbeek (pri Ĉinio) aŭ E. Mustea (pri Karibio) pere de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.



FARIĜU PIONIRO!

Kiam en la naŭdekaj jaroj la komputila traduksistemo DLT plene funkcios, ĝi havos ne nur multajn lingvojn, sed ankaŭ multajn pionirojn: tiujn kiuj preparis kaj konstruis la ligon inter sia propra lingvo kaj Esperanto, la ĉefa spino de la DLT-reto.

Por pligrandigi la kandidataron de DLT-kunlaborantoj, sed ankaŭ por kontribui al la ĝenerala nivelo de lingvistika sperteco kaj klereco en Esperantujo, la firmao BSO organizos

fakan kurson


celatan al (junaj) lingvistoj, tradukistoj aŭ informadikistoj kun intereso aŭ specialiĝo pri lingvoteknologio. La kurso temos pri

formala kontrasta sintakso.

Dum tiu kurso (1-3 de aŭgusto 1988, en la DLT-laborejo de BSO, Utrecht, tuj post la UK en Rotterdam) vi lernos dependosintakson kaj metataksan, la gramatikan modelon por priskribi traduktransirojn inter du lingvoj. Vi lernos tion de teamo de teorie-praktike spertaj fakuloj: d-ro Dan Maxwell, lic. Dorine Tamis kaj nia ĉeflingvisto, d-ro Klaus Schubert.

Por ĉiuspecaj pluaj informoj turnu vin al d-ro Maxwell. La nombro de kursanoj estos limigita. Por certigi vian lokon, necesas antaŭpagi la kurskotizon al konto 22.58.09.443 de la banko Van Lanschot (Hago) kun la indiko "BSO, kurso 1-3 aŭgusto". La poŝtĉekkonto de la banko estas 3601923 (en Nederlando). La kotizo estas ĝis la 1-a de junio 250 (studentoj 190) kaj poste 400 (studentoj 300) guldenoj. Personoj el netranspagipovaj landoj povas (ĝis la 1-a de junio) peti pri speciala aranĝo.

Nia adreso: BSO/Research, Poŝtkesto 8348, NL-3503 RH Utrecht, Nederlando.
 Telefono (..31-/0)30-911911 au 30-911705. Telekso 40342.
 Komputilreta adreso: maxwell@dlt1.uucp




MALKOVRU nekonatan parton de Nederlando kun ĉarmaj montetoj kaj dolĉaj valoj, provinco de mezepokaj kasteloj, antikvaj akvoradoj kaj bona biero, triangulo inter la franca, germana kaj nederlanda lingvoregionoj: **Limburgo.**

Antaŭkongreso de la 73a UK Epen, 16-23 julio 1988.

La programo inkluzivas ekskursojn tra la regiono kaj kulturajn okazaĵojn, entute ĉion necesan por tutsemajna senzorga ripozado.

Kotizoj: 850 gld. ĝis la fino de marto, poste 900 gld.; kelkaj unuopaj ĉambroj haveblas kontraŭ krompago de 125 gld. Trajnvojaĝo al Roterdamo por la UK kostas 27,50 gld. **Informoj kaj aliĝiloj** haveblas de s-ino E. Kervers-van Tholen, Tienbundersweg 38, NL-6321 CR Wijlre, Nederlando, tel. 04450-1248, kaj de la Centra Oficejo de UEA, kien oni sendu la aliĝilon kun la pago.



La plej junajn
esperantistojn
celas

VENIS VESPERO

nova infanlibro planita por denaska instruado de Esperanto, kun aparta enkonduko pri dulingva edukado de infanoj. Tradukita de Amri Wandel, laŭ H.C. Andersen. Havebla ĉe la libroservo de UEA (ĉ. 6 gld.) kaj ĉe ELNA. (\$3)

UEA serĉas organizanton-administranton por siaj Universalaj Kongresoj.

Konstanta Kongresa Sekretario

Funkcioj: Inkluzivas buĝetadon kaj librotenadon, redaktadon de kongresaj eldonaĵoj, laborkunordigadon kaj korespondadon. KKS kunlaboras kun Loka Kongresa Komitato kaj respondecas pri kongresa politiko al la Estraro de UEA.

Kvalifikaĵoj: Studoj pri ekonomiko, sociologio aŭ manĝeraĵaj sciencoj estas bonvenaj. Necesas flua, bonnivela rego de Esperanto; kono de aliaj lingvoj estas tre dezirinda. Kandidato devas posedi kelkjaran sperton kiel aktiva esperantisto, organizan kaj mastruman talenton, kapablon kunordigi grupan laboron, agrablan kaj firman karakteron, facilan kontakti homojn kaj harmonie kunlabori kun ili, entuziasmon kaj iniciatemon. La posteno aparte taŭgas por persono inter 25 kaj 35 jaroj, prefere ne edz(in)iĝinta.

Sendu kandidatigojn aŭ eventualajn informpetojn al la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando.

Mi serĉas ĝeneralrepresentant(in)on por senkonkurenca produkto. Avantaĝo estas sukcesplena praktiko en ekstera servo kiel reprezentant(in)o. **Kontaktadreso:** Rudolf Jax, Linzer Bundesstr. 67, 5023 Salzburg, Austrio.

La respondo vi tamen ricevos ne en Esperanto, sed en la angla aŭ germana, ĉar mia tasko estas nur la ricevo kaj traduko en la germanan de la leteroj. La kroman skribadon faras la koncerna firmao mem.

El la eldonejo de UEA:

VETERO KAJ KLIMATO DE LA MONDO

Denis Riley & Lewis Spolton/tr. Kris Long

Ĉu ankaŭ vi konfuziĝas inter cirusoj, stratusoj kaj kumulusoj? Ĉu vi scivolas pri la rilatoj inter etiopia sekiĝo kaj svislanda inundo? Aŭ ĉu vi nur volas prognozi, ĉu pluvos hodiaŭ? Ĉiukaze vi profitos el ĉi tiu renoma popularscienca verko, kiu per amaso da ilustraĵoj kondukas vin senerare tra la meteologia labirinto. 132p. 25cm. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 28,50 gld. plus sendokostoj; 1/3 rabato ekde tri ekz.

Ĉi tiu loko meritas **vian** anoncon.
Profitu de la plej multlegata Esperanta revuo!
Tarifo en la internkovrila kolofono.

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO.** Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

POST LA TUMULTO de la Universala Kongreso, eblos trovi ripozon ĉe la Oficiala Postkongreso nordokcidente de Amsterdamo. La

Turisma Esperanto-Kongreso Alkmaar, 30 julio-6 aŭgusto

donos al kongresanoj la eblecon pli intime konatiĝi kun la historio kaj kulturo de Nederlando, per muzevizitoj, ekskursoj al pitoreskaj vilaĝoj, ŝipveturoj tra la kanaloj kaj trapromeno de moderna fromaĝfabriko.

Kotizoj: 775 gld. ĝis la fino de marto, poste 825 gld.; unuopa ĉambro haveblas kontraŭ krompago de 210 gld. Vojaĝo de Roterdamo al Alkmaar kostas 25 gld. **Informoj kaj aliĝiloj** haveblas de Pk. 8188, NL-1802 KD Alkmaar, Nederlando, aŭ de la Centra Oficejo de UEA, ĉe kiu oni aliĝu kaj pagu.